

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Duobla jubileo de nia
gazeto: 200 numeroj
dum 20 jaroj

La legantoj gratulas kaj
bondeziras

La unua IEK en Ĉinio

Landaj kongresoj en
Francio, Pollando kaj
Israelo

“Savi la vivon!”

Ondo da donacoj por
helpi al Halina

La dua esperantologia
eseo de Rokicki

“Amiko Jozefo”

Guy de Maupassant
(Jean-Luc Tortel)

La forgesita eldonejo



2011

6

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №6 (200)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2011

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 550 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №6 (200).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 мая 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

«Kara Sinjoro! Kun granda plezuro mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto “la Ondo de Esperanto”. Dum eĉ plej malgrandaj nacioj havas sian Esperantan organon, la granda ruse-parolanta nacio restis en la lasta tempo tute sen organo; tial la apero de via gazeto, kiu metas finon al tiu stranga kaj bedaŭrinda situacio, sendube estos ĝoje salutita de ĉiuj niaj amikoj. Mi deziras al Via gazeto la plej bonan prosperadon; mi esperas, ke Via energio kaj persisteco baldaŭ akiros por Via gazeto konfidon kaj estimon de la tuta esperantistaro kaj antaŭ ĉio kunlaboradon kaj subtenadon de ĉiuj esperantistoj rusaj», — skribis la 16an de marto 1909 Ludoviko Zamenhof al Aleksandr Saĥarov, kiu sendis al li la unua numeron de *La Ondo de Esperanto*.

Saĥarov atingis sian 100an (fakte, la 100–101an) *Ondon*, sed tiu jubilea kajero restis la lasta en lia serio — la bolŝevistoj ne permesis al privatulo eldoni sendependan gazeton.

Nia situacio estas pli feliĉa. Hodiaŭ, la 17an de majo, ni sendos al la presejo nian 200an *Ondon* — jen jubileo! Krome, ekzaktege antaŭ 20 jaroj, la 17an de majo 1991 per fotokopiilo estis fabrikitaj kaj mane vinktitaj la unuaj ekzempleroj de №1 de la 2a serio de *La Ondo* — duobla jubileo! Kaj, tute hazarde, la nuna kajero, je la jubilea tago, faras la 2an serion de *La Ondo* duoble pli ampleksa ol la 1a.

Per ĉi tiu numero ni omaĝas al niaj grandaj antaŭuloj — Ludoviko Zamenhof kaj Aleksandr Saĥarov. Sed, ĉefe, ni dediĉas ĝin al niaj legantoj — nunaj, kiel Fritz Hilpert sur la suba foto, kaj estontaj, kiel la serioza knabineto provanta surargilan skribadon en la Peterburga Lingva Festivalo sur la kovrilpaĝa foto de Olga Rindina.

Gratulon al vi, al ili – kaj al ni!

Halina kaj Aleksander



Duobla jubileo de “La Ondo”

Persone mi abonas nur tri periodaĵojn Esperantajn, sed ja unu el ili estas ĝuste *La Ondo de Esperanto*. Mi aparte ĝojas pri jam regula kunlaboro inter la gazeto kaj E@I — kaj volonte kunlaboras pri la enhavo.

Mi esperas, ke evoluo de e-legiloj, poŝtelefonoj, iPad kaj similaj *ludiloj* ankaŭ tamen helpas al la kresko de kvanto da legantoj — minimume de la elektronika versio de via/nia gazeto!

Mi forte rekomendus al almenaŭ diversaj Esperanto-kluboj, kiuj ja daŭre relative abundas — aboni la revuon (ankaŭ papere) por siaj kluboj, bibliotekoj. La enhavo estas varia, riĉa kaj certe utilas por Esperanto-publiko.

Elkoran gratulon por la duobla jubileo! Multan sukceson kun sekvaj, minimume 200 numeroj!

Peter Baláž (Slovakio)

Multajn gratulojn al la redakcio de *La Ondo*, kiu post dudek jaroj de kresko nun atingas sian plenaĝecon! Mi trovas la revuon aparte interesa, ĉar ĝi ne reprezentas tiun aŭ alian partion de la Esperanto-movado, sed strebas prezenti (kaj reprezenti) la movadon kiel tuton. En ĝi mi trovas ne nur materialon pri la nuntempo, sed ankaŭ seriozajn artikolojn pri la historio de la lingvo kaj movado, kiujn mi ĉiam tralegas kun intereso kaj poste utiligas en mia propra laboro.

Kaj kion nun faru la “plenaĝa” revuo? Unuavice, sekvi la jam sekvatan vojon. Nia Esperanto-komunumo funkcias efike nur tiam kiam la parolantoj de la lingvo havas komunan scion pri ĝia pasinteco, ĝiaj kulturaj valoroj, ĝiaj verkoj, ĝiaj grandaj personecoj — kaj nur se ili aplikas tiun pasintecon, tiun heredaĵon, al la nuntempo kaj la estonteco. *La Ondo* multe helpas nin atingi tiun kombinon de scio kaj konscio.

Humphrey Tonkin (Usono)

Legi LOdE: estas tro dirite; prefere mi trarigardas kaj elektas tion, kio interesas min. Mi trovas en ĉiu numero ion valoran kaj interesan por mi kaj, kiel sciante, mia intelekta gusto estas severa kaj kaprica. La revuo devas iel politiki por vivi, ne kontraŭi al potenciala abonantaro, la arto malfacila. Tamen tiun arton posedas LOdE en kiu okazas polemikoj ne eblaj en la organo de UEA, en la gazetoj de LF-Koop, eĉ en LKK.

LOdE estas unusola revuo, kiu respektas ĵurnalisman deontologion disponigi la forumon al diversaj tendencoj ideologiaj en Esperantio. Se konsideri, ke en la revuo aperas intervjuaĵoj kun Giorgio Silfer kaj Osmo Buller (mi pardonpetas ambaŭ pro la hazarda elekto), kaj ke LOdE publikigas mian ironian recenzon pri *Vivo de Zamenhof* kaj la mokan ombron pri tio esprimas Reinhard Haupenthal, kaj ĉion ĉi komprenas nur tiuj, kiuj devas kompreni, — jen la granda arto redakti!

Walter Żelazny (Pollando)



La Ondo apartenas al la plej stabilaj kaj nemalhaveblaj elementoj de la nuntempa Esperanta kulturo. Min impresas ne nur la multflankeco de la uzataj ĵurnalismaj elementoj, sed ankaŭ la enhava varieco. Observante la agadon de la eldonejo *Sezonoj* oni devas alte aprezi la agantojn Halina kaj Aleksander. Mi foje tamen pensas, ke redaktoro ne ĉion devus akcepti, sen timi la riproĉon pri cenzurado. Sed verŝajne onda moviĝo, eĉ kun provokoj, ja estas celata, por altiri diversspecajn legantarojn.

Foje mi dezirus malpli da movadaĵoj, legeblaj ankaŭ aliloke, kaj pli da analizoj (de la tipo “Libroproduktado sub la lupeo”). Tre bonvenas la movadhistoriaj kaj kulturhistoriaj popularsciencaj eseoj, ĉar tia revuo ja ankaŭ havas klerigan funkcion. Laŭ mi dezirindas pli la eseoj kaj analizoj pri la historio de la rusa, aparte de la sovetunia, movado.

Mi deziras, ke la Ondo longe pluekzistu portante la verdan ŝipeton al bonvenaj bordoj.

Detlev Blanke (Germanio)

Ni memoras la komencojn de *La Ondo*. Tiam ni ne tiom certis, ke la nova revuo trovos sian lokon en la E-gazetara merkato. Dumtempe, *La Ondo* evoluanta iĝis por ni sinteza (ĉio en unu) montrilo de la soci-kultura stato de la esperantista vivo. La revuo iĝis ankaŭ “nia publikigilo”, dank’ al kiu ni povis prezenti kelkajn gravajn problemojn. Ni ŝatas ankaŭ la neripetebajn bildojn dum Arkones, kiam Aleksandro kun rideto informas, ke nun estas pli bone ol antaŭ jaro. Tio signifas, ke denove plialtiĝis la nombro de abonantoj.

Nun jubileo! Niaj koroj batas pli trankvile — *La Ondo* vivas!

Iłona Koutny kaj Zbigniew Galor (Pollando)

Kun varma koro mi salutas la verajn jubileantojn. Mi celas la geedzan paron kiu tiel sindoneme oferis kaj daŭre alportas filojn siajn al Esperantujo: aprezinde regulan kaj pluralisman revuon, multajn librojn, retejojn, podkastojn, ktp. Rimarkante ilian imprese persistan kaj produktopovan laboron, neeviteble mi pensas pri Zamenhof kaj multaj ceteraj kiuj pene, kreeme kaj utile fosis siajn (niajn) sulkojn por la bono de tiu ĉi kolektiva iniciato. LOdE estas plia pruvo ke Esperanto iĝis vivipova fakto, daŭre kapabla fajrigi la koron kaj imagokapablon de novaj homoj tra la generacioj.

Prezentante sin kiel daŭrigon de la unua *Ondo* (1909-1917), la nuna revuo helpas konekti nin al nia priferinda tradicio. Eĉ se tiam regis pli da optimismo pri iu kreskanta ondo de Esperanto, ni lernis ke temis kaj temos pri diversaj, sinsekvaj, ne ĉiam koincidaj ondoj. Solidare al Halina kaj Aleksander en tiu ĉi malfacila momento, mi forte brakumas kaj dankas vin.

José Antonio Vergara (Ĉilio)





La ĉefa atuto de LOdE antaŭ dudek jaroj? Ĝia kapablo fenestri al (kaj el) la nova socio post la ruino de Sovetunio, kombine al ĝia atento pri la fenomeno esperanto. Tiu kapablo reduktiĝis iom post iom, kaj hodiaŭ LOdE ŝvebas ie inter la organo de UEA kaj *Heroldo de Esperanto*, sen la tiama karakteriza efikeco.

LOdE devus reveni al sia origino, de rusa fenestro al Esperantio, sen zorgo pri kiu el la du realaĵoj (Ruslando aŭ Esperantio) estas pli neeltenebla getto...

Giorgio Silfer (Eŭropo)

La Ondo de Esperanto estas unika en la nuntempa Esperanta komunumo pro ĝia multflankeco kaj kultura enhavo. Per unu gazeto eblas informiĝi pri plej diversaj aspektoj de lingvo, kulturo kaj movado. La revuo ne ekzistas por propagandi por unu grupo aŭ tendenco sed donas vorton al pli-malpli ĉiu, sen alia cenzurado ol la redakta prefero kaj evito de insultoj.

Se mi devus elekti nur unu esperanto-revuon, mi sendube elektus la *Ondon*.

Jukka Pietiläinen (Finnlando)



La Ondo de Esperanto laŭ mi unuavice estas specimeno de vere profesia rilato al afero. Diletantoj multas, profesiuloj male, do des pli aprezinda estas tia agado. Krome la magazino estas laŭdira pro ĉiama malfermiteco por esprimado de diversaj vidpunktoj kaj daŭra rekta interkomunikado kun aŭtoroj — aktualaj kaj eventualaj, informfontoj k. a.

Mi gratulas gesinjorojn Korĵenkov kaj Goreckaja okaze de la jubileo kaj deziras al ili longajn jarojn da plia sukcesa laboro.

Grigorij Arosev (Ruslando)

prezidanto de Rusia Esperantista Unio

Miajn gratulojn al la *Ondo* okaze de la duobla jubileo — la eldono de la ducenta kajero de LOdE kaj dudek jaroj de ĝia eldonado. Mi deziras al la eldonanto kaj al la redaktoro sanon, sukceson kaj ĝojon en ilia laboro, multe da legantoj, por ke la revuo ankoraŭ longe ekzistu kaj restu same interesa, informplena, esperiga, distra. Kaj mi preferus, ke la *Ondo* estu pli beletra kaj malpli movadeca ol nun, ĉar multajn informojn pri Esperantaj aranĝoj oni povas ekscii el aliaj gazetoj.

Vladimir Vyčegjanin (Ruslando)



Bjalistoka Esperanto-Societo elkore salutas siajn honorajn membrojn Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, danke pro iliaj zorgoj, okaze de la 20-jariĝa jubileo de la eldonado de *La Ondo de Esperanto*.

Bjalistokanoj alte taksas la eldonatan de vi gazeton kaj legas ĝin ĉiam kun plezuro. Ni deziras al ĝi sekvajn 20 jarojn sub la sama gvidado, ĝi restu same interesa kaj havu milojn da legantoj en la tuta mondo.

Nome de bjalistokaj esperantistoj

Elżbieta Karczewska (Pollando)



En la nuna mondo de ĉieaj komputiloj kaj ĝenerala virtualiĝo, estas freŝige ĉiumonate enmanigi al si *La Ondon*, kiu elstare pruvas la ekzistigindon de paperaj produktoj ankaŭ en Esperantujo.

Tre klare strukturita, enhave valora kaj varia, *La Ondo* alportas unike ekvilibran mikson de movadaĵoj kaj mondaĵoj, de faktoj kaj fantazioj, montrante ekzemplon al aliaj verdaj periodaĵoj malpli ambiciaj.

Je ĉi tiu duobla jubileo, mi egoisme deziras al mi mem ankoraŭ longe resti konstanta kunlaboranto de mia preferata monatrevuo Esperanta!

István Ertl (Luksemburgo)

Kara redaktoro, el la periodaĵoj *Esperanto*, *Sennaciulo*, *Monato*, *Literatura Foiro*, *Heroldo de Esperanto*, *La Kancer-Kliniko*, *Beletra Almanako* kaj *La Ondo de Esperanto*, al mi la plej plaĉas la du lastaj. Sana menso restos en sana korpo.

Duobligu la vivon de *La Ondo* kaj tiun de via kunulino de la vivo.

Ĉerizfloroj (Japanio)

dumviva abonanto de *La Ondo*



Mi gratulas la eldonantojn kaj kunlaborantojn de *La Ondo* pro la jubilea ducenta numero. Gratulon kaj dankon precipe al Halina Gorecka — kun bondeziroj pri resaniĝo — kaj Aleksander Korĵenkov. *La Ondo* estas unu el la plej gravaj kulturaj revuoj en nia lingvo kaj ludas neanstataŭigeblan rolon. Mi iom bedaŭras la spacon dediĉatan al pure lokaj eventetoj kaj fojfoje al administraj problemoj de unu — eĉ se la plej grava — esperantista asocio. Sed mi komprenas kaj aprobas la zorgon trovi abonantojn en sufiĉe larĝa publiko de heterogena socio.

Longan vivon al *La Ondo*!

Michel Duc Goninaz (Francio)

Mi bondeziras al *La Ondo de Esperanto* multajn novajn abonantojn, pliajn sukcesojn sur la kampo de disvastigo de rusa kulturo kaj literaturo, pligrandiĝon de la prestiĝo de la gazeto en la tuta mondo kaj, certe, multjaran prosperon al la eldonejo kaj ĝiaj senlacaj agantoj Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka!

Svetlana Smetanina (Ruslando)

Estas bone, ke *La Ondo de Esperanto* videble penas koncentri intelektajn kaj valorajn fortojn de la Esperanto-komunumo ĉirkaŭ si — evidente tio estas tute ne facila. La persisto kaj kontinueco do estas verŝajne la plej taŭgaj vortoj por priskribi vian agadon, estimataj Halina kaj Aleksander, kaj ĉiuj kiuj laŭeble kaj heroe kontribuas al la Afero. Mi pensas ke la veran rolon de la *Ondo* en la monda Esperanto-gazetaro historio ankoraŭ difinos.

Andrej Peĉonkin (Ruslando)

Koran dankon pro la gratuloj kaj bondeziroj!

Halina kaj Aleksander

IEK: Unuafoje en Ĉinio

En 2009 en Kondoros (Hungario) Peng Zhengming proponis organizi Internacian Esperanto-Konferencon en Wuhan. Tiu loko estis elektita por 2011. Nia karmemora Lena de Zilah longe korespondadis kun ĉinaj verkistoj, kies artikoloj aperis en *La Gazeto*, kaj ŝia granda deziro estis, ke IEK iam okazu en Ĉinio. Lena, jen ni kaj viaj ĉinaj korespondantoj! Vi kaj Zhengming sukcese kunligis nin!

La akcepto estis eksterordinare varma. Tuj post nia trajna alveno el Pekino, ni (francoj, germanoj, hungaroj, italoj, polinoj, rumanino) estis gastigitaj en bela salono, ĉirkaŭ rondaj tabloj kie estis disponigitaj belaj kaj bongustaj manĝaĵoj. Ĉiuj prezentis sin. Samtempe bela programo disvolviĝis: koruso, legado de surpergamena poemo de Hu Guozhu poste donacita al mi, luktarta demonstraĵo, teatraĵo. En la sekvantaj tagoj la programo estis altkvalita kaj densa:

Prezentado de la OSIEK-premiindaj libroj, inter kiuj *Ĉe Akvorando* tradukita de Laŭlum (Li Shijun). Temas pri unu el la du pli famaj ĉinaj romanoj, unue rakontita en foiroj, poste skribe verkita en la 14a jarcento, atribuita al Shi Nai'a kaj Luo Guanzhong: 1830 paĝoj, tri volumoj! Banditoj ribelantaj kontraŭ la korupciita povo vojiradas, drinkas, batalas kaj murdas, estas enkarcerigitaj, fuĝas.

Peng Zhengming, la perfekta organizanto de nia aranĝo, prezentis sian urbon Wuhan, Zhang Danchen la tri volumojn de *El verda klavaro* de Hu Guozhu, kaj Denis Keefe la projekton *Feliĉa insulo*: tutmonata Esperanto-kurso en la suda tropika insulo Hainan. Alloga!

Poste disvolviĝis la elektita temo: "La Ĉina Saĝo". Eŭgeno de Zilah pri-traktis ĝin en Eŭropa perspektivo. Hu Guozhu parolis pri ĉina Saĝo kiel iom el hanligvo kaj arte prezentis diversajn mirformajn poemojn: pagodo reflektiganta en akvo aŭ palindromo. Wang Chongfang, kiu ne povis veni, petis ke oni legu lian prelegon pri *Dao de Jing* atribuita al Laozi. Ĝi estis tiom densa, ke de Zilah proponis, ke ĝi aperu en *La Gazeto*. Tajvana doktoro Zhaoming Cho (Abengo) kontribuis per *Daŭdeĝingo kaj Iĝingo*, kaj Michel Fontaine, franco kiu edziĝis kun ĉina instruistino, raportis pri "Ĉinoj per eŭropaj okuloj". Wei Yida (Vejdo) brile parolis pri sia fako: ĉinesko. Temas pri esperantigo de



Wuhan: Shi Shengtai kaj Anne Jausions (Fotis Eric Laubacher)

la ĉina tradicia fiksoforma poemo *Ci*, kiu originis el Tang-dinastio (618-907 p. K.). Shi Chengtai, kiu venis el la malproksima nord-orienta provinco Heilongjiang, prelegis pri konfuceismo. Kaj pri budismo, bonzo Miaohui, trankvile, kviete parolis ne nur en la konferenĉejo, sed ankaŭ en la templo Baotong, kaŝita en parko.

Ankaŭ la turismaj posttagmezaj aŭ vesperaj programoj estis altkvalitaj. En ĝardendomo memorinda akcepto atendis nin. Koncerto, sed ankaŭ te-ceremonio, kvieta, gracia. Kia ĉarma spektaklo, tiuj kvar junulinoj surhavantaj verdan, ruĝan, flavan, blankan robojn: printempo, somero, aŭtuno, vintro. Estas danco, spektaklo de elverŝado de diverssezonaĵoj de te-potoj en tasojn. Vespere la kultura programo daŭris. Liu Zhichun ludis per ĉina instrumento. Liu Jianchao enkondukis nin en la kulturon de la urbo Huizhou. Yu Jianchao, el la Ĉina Radio, montris la manieron ĝentilece uzi manĝbastonetojn. Nia korea partoprenanto Ho Song ekspoziciis siajn vivkolorajn pentraĵojn.

Kaj tuta tago estis dediĉita al la malkovro de Wuhan: muzeo de la Hubei-provinco kun interalie la tombo de Ji Markizo, kiu havis reĝan statuson. Ĝi konsistis el pluraj ĉambroj en kiuj oni malkovris bronzajn rezervujojn, armilojn, muzikinstrumentojn kaj mirindan gigantan sonorilaron.

Poste, vizito de la granda domo de la loka asocio, restaŭrigata, posedaĵo de Peng Zhengming, ĉe la lago. Proksime, tagmanĝo en surfostaj bambou-dometoj. Promenado en parko laŭlonge de la rivero Jang-Tse-Kiang. Tie atendis nin lokaj esperantistoj, kiuj denove honoris nin.

Claude Jausions kaj Wang Min Hao el Ŝanhajo gvidis kurson por komencantoj, helpataj de Stéphane Laubacher,

dekdujara, la sola infano de nia renkontiĝo.

Dum la antaŭkongreso en Pekino, ni malkovris la placon Tian An Men, la ankoraŭ nedetrinitajn dometojn *hutong*, la Muregon, la antikvan Palacon, la templon de la Ĉielo, sed tio pro kio ni ŝatas Esperanton estas la invito al la hejma vivo: agrabla vespermanĝo en la ĝardeno de Wang Yanjing (Freŝa Maro), la filo de Ye Chuan-Chan (Cicio Mar). Li montris al mi librojn verkitajn de la patro, fama pro *Montara Vilaĝo* kaj tradukoj el Andersen. Survoje al Wuhan, ni vizitis la urbon An Yang. Ĝi enhavas du mirindajn muzeojn: la nacia muzeo pri la ĉina skribarto, kiu prezentas specimenojn el la unuaj ĉinaj skribaĵoj sur testudaĵoj kaj sur ostoj kaj la antikva loko YinXu el la Shang dinastio.

La OSIEK-Premio estis atribuita al Laŭlum pro la traduko de *Ĉe Akvorando*. Bele, ke ĉina verkisto estas premiita. En 2010, en Herzberg-am-Harz (Germanio) estis Baldur Ragnarsson, je la sojlo de sia okdek-jariĝo, kiel li skribis poste al mi, kiu ricevis la premion pro la traduko de *Sagao de Njal*. Post du jaroj Laŭlum estos je la sojlo de sia 90-jariĝo. Laboregemaj, mirindaj verkistoj ekzistas en Esperantujo!

Venontaj IEK okazos la trian plenan semajnon de julio: en 2012 en Svitavy, (Ĉeĥio), organizota de Petro Chrdle kun la temo *Robotoj kaj sciencfikcio*; en 2013, meze de Francio en Saint-Amand-Montrond, organizota de Ĵak LePuil kun la temo *Esperanto kaj muziko*.

Anne Jausions prezidanto de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj)

Wuhan: Pagoda akrostika poemo de Hu Guozhu montrita dum interkona vespero (Fotis Eric Laubacher)



Inter-Asocia renkontiĝo en Seto

22–26 apr 2011 en Seto (france: Sète) la Inter-Asocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM) akceptis buntan partoprenantaron de preskaŭ 400 homoj.

La antaŭa simila renkontiĝo okazinta en 2005 en Bulonjo sur Maro renkontis tiom grandan sukceson, ke la organizantoj devis malakcepti malfruajn aliĝintojn. Ja temis ne nur pri renkontiĝo en kiu partoprenis diversaj asocioj, sed ankaŭ pri jubileado de la Unua Kongreso okazinta samurbe, cent jarojn antaŭe.

Tiu sukceso levis entuziasmon kaj deziron, ke de tempo al tempo (se eble ĉiun trian jaron) la diversaj organizaĵoj, kiuj agas por Esperanto en franclingvaj landoj, okazigu komunan aranĝon. La afero montriĝis ne tiel facile realigebla.

En la Langvedoka-Rusiljona Federacio de pluraj jaroj kelkaj volis inviti al tia renkontiĝo. Ni do ĝojas ke asocioj, kiuj ĉiuj havas proprajn ecojn, apartan historion kaj kutimojn, sukcesas de tempo al tempo kunigi siajn fortojn por ebligi elstaran eventon kaj esplori vojojn de kunlaboro sur komunaj terenoj.

En Francio kunezistas Espéranto-France kaj SAT-Amikaro, franclingva fako de SAT. Ankaŭ fervojistoj okazigas propran jaran aranĝon. La du unuaj organizaĵoj havas teorie kontrastan pozicion: la unua estas neŭtrala por-Esperanta, la dua progresema laborista per-Esperanta. En plurjardeka historio la du organizaĵoj ofte estis en akra konflikto, eĉ foje kun drameco ligita al enlandaj politikaj eventoj. Tiuj tempoj estas for, kaj nun ili, konservante sian identecon, agnoskis unu la alian kaj interkonsentas pri komunaj agadoj. Dum IREM iu laborkunsido estis dediĉita al interasocia kunlaboro

kun notinde lanĉo de peticia kampanjo, por ke Esperanto estu akceptita ĉe franca abituria ekzameno.

Kaj jen la atingo: en la feriejo *Le Lazaret*, ĉe la mediteranea bordo en la gastama urbo Seto, laŭ invito de Franca Fervojista Esperanto-Asocio, de Espéranto-France, de SAT-Amikaro kaj de la Langvedoka-Rusiljona Federacio, kunvenis pli ol 390 homoj el ĉiuj regionoj de Francio kaj el pli ol 20 diversaj landoj.

La invitataj asocioj kaj kelkaj aliaj asocioj (Instruistoj, Katolikoj, EDE, FET) havis siajn kutimajn kunsidojn — plenkunsidojn, laborkunsidojn kaj komitatkunsidojn.

La turisma oferto estis riĉa: en kvin tagoj la aliĝintoj povis ĝui la riĉaĵojn de la Seta regiono partoprenante unu aŭ plurajn vizitojn kaj ekskursojn al diversaj celoj: lageto de Taŭo, suda Kanalo, eta Kamargo, cevena trajno.

La kultura programo estis aparte abunda (tro laŭ ies vidpunkto): oni povis aŭskulti prelegojn, partopreni atelierojn kaj laborgrupojn kaj spekti prezentojn pri diversaj temoj: fervojo, literaturo, lingvistiko, okcitana kulturo, Esperanto sur politika tereno kaj en interreto, foraj landoj, ktp.

Al tiu programo kontribuis ok gastoj el fremdaj landoj: Senad Čolić el Bosnio, Maria Guttiérrez Gonzalez el Kubo, Katalin Kováts hungarino loĝanta en Nederlando, Marek Blahuš el Ĉeĥio, Sanpei Keiko el Japanio, Narendra Raj Bhattarai el Nepalo, Abel Montagut kaj Ferriol Massip i Bonet el Katalunio.

Renkontiĝo kun multnombra partoprenantaro kiel IREM ofertas favorajn kondiĉojn por organizi lingvajn ekzamenojn: ĉi tie kandidatoj (entute 30) povis trapasi ĉu ekzamenon de la jam multjara

inter-asocia instanco Franca Esperanto-Instituto, ĉu ekzamenon en la Komuna Eŭropa Referenckadro gvidatan de d-ino Katalin Kováts.

Dum la renkontiĝo estis kvar spektaklaj vesperoj. FaMo, al kiu aliĝis pluraj aliaj muzikistoj kaj kantistoj, etosis la interkonan vesperon.

Sabate vespere, Dominiko Gaŭtiero prezentis, en la kinejo Comoedia en la urbocentro, premiere la dokumentfilmon kiun li ĵus finpretigis: la projekciado estis malferma al la loka publiko. La filmo estis ankaŭ projekciata dimanĉe kaj marde en la renkontiĝejo. Laŭ la mendo de la Eldona Fako Kooperativa de SAT, Gaŭtiero faris ne reklaman dokumentfilmon, sed libere traktis la Esperanto-movadon laŭ sia propra ekstera vidpunkto: la filmo precipe konsistas el intervjuoj kun diversaj homoj kiuj ĉiuj prezentas aspekton de la movado.

Lunde, en la vespera programo Teatra Trupo de Tuluzo prezentis novan version de la sukcesa *Grandioza Kongreso* de Rikardo Cash. (Pri la muzika programo legu en la 24a paĝo).

Aparte dankindaj estas ĉiuj, kiuj kontribuis al la realigado kaj la sukceso de IREM:

— la asocioj Espéranto-France, SAT-Amikaro, Franca Fervojista Esperanto-Asocio kaj Langvedoka-Rusiljona Federacio, kiuj de preskaŭ du jaroj interkonsentis por ke tiu projekto realiĝu;

— la membroj de la Langvedoka-Rusiljona Federacio kaj precipe de LOKO (la Loka Organiza KOMitato, ĉ. 20-homa teamo), kiu de du jaroj regule laboris por efektiviĝi ĝin;

— la volontuloj, kiuj de pluraj monatoj kaj precipe en ĉi tiuj tagoj transprenis ĉiaspecajn taskojn;

— la feriejo *Lazaret*, kiu afable ofertas tute taŭgajn eblecojn por la renkontiĝo;

— la turisma oficejo de Seto, kiu ofertas Esperantlingvajn informilon kaj aŭdogvidatan viziton de la urbo, kaj malavare provizis diversajn dokumentojn kaj helpojn;

— la mediateko de Seto, kiu gastigas ekspozicion pri Esperanto kaj proponis malkovroatelierojn por gejunuloj en la semajno;

— la urbo Seto, ties oficistoj, ties urbestro kaj ties urbestro François Commeinhes, kiuj varme akceptis kaj konsiderinde subtenis la organizadon de IREM.

La retejo de la renkontiĝo: <http://esperantosete2011.fr>

Arno Lagrange



Pollando: Civitana aktiveco

Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazis 30 apr – 7 maj 2011 en la intermontara urbo Nowy Sącz (100 km sud-oriente de Krakovo) kun 169 partoprenantoj.

La klerigan programon gvidis la plej meritaj personoj de la landa movado: Ilona Koutny, Zbigniew Galor, Lidia Ligeza, Roman Dobrzyński, Tomasz Chmielik, kaj alilandaj gastoj: Zsófia Kóródy, Zlatko Tišljar, Petro Balaž. Ili realigis temojn pri edukado, instruado, informado, monakirado, partnera kunlaboro, ekstera propagando. Trifoje oni elektis la rolon de filmo por Esperanto dum la programeroj de Roman Dobrzyński, Przemek Wierzbowski, Andrzej Sochacki. Pri uzo de modernaj iloj en la Esperanto-agado instruis nin Petro Balaž; konsilojn pri Esperantaj-kursoj kaj gazetartikoloj donis Stano Marček. Zlatko Tišljar rakontis pri novaj projektoj de financado por Esperantaj organizaĵoj kaj — antaŭ la granda manifestacio kun kantado de la Eŭropa Himno — prelegis pri la ideo de himno, kaj el la granda ekrano salutis nin Margareta Handzlik el la Eŭropa Parlamento.

Okazis manifestacio sur la centra placo ĉe la urbodomo, kien venis korusoj kaj soldata orkestro de limgardistoj. Salutis la urbestro Bożena Jawor kaj Zlatko Tišljar nome de EEU. Liceanoj kun flagoj de EU-landoj, montris spektaklece naskiĝon de la oraj eŭropaj steloj. Korusoj kantis la himnon de Eŭropo en Esperanto kaj en la pola. Tia estis nia festado de la Tago de Eŭropo kaj prapremiero de publika prezentado de la Eŭropa Himno en neŭtrala lingvo.

La Kongreso allogis eksterlandajn artistojn, kiel Manüel, kiu kantis “duonvoĉe... tutkore” kun prezento de sia disko, kaj la publikon dancigis dum sia koncerto kiel ĉiam — Jomo. Prezentiĝis ankaŭ polaj artistoj Joanna A. Clifford, Anna Buda, Leokadia Rózik, Jeremiasz Ratajczak kaj aliaj.



Kongresanoj antaŭ la urbodomo de Nowy Sącz

Valoraj kaj altnivelaj estis la programoj poezia kaj teatra de Lidia Ligeza pri magio de amo, kaj de Krystyna Dulak-Kulej kun nove eldonita dulingva poemaro. Majstre preparis la spektaklon *Ludoviko Lazaro* Jerzy Handzlik, kaj Helena Biskup pollingve prezentis la monodramon de Carlo Migliucci *Doktor Esperanto*.

La plej grava arta atingo de TEK iĝis la premiera spektaklo de *Roma Triptiko*, preparita de la teatro aganta ĉe la Urba Kulturcentro. La reĝisoro de la spektaklo Janusz Michalik ankaŭ recitis, kaj montriĝis alta nivelo de artistoj, belege deklamantaj la filozofian poezion de Johano Paŭlo la Dua.

Ludis por la kongresanoj granda simfonia orkestro kun solaj kaj duetaj kantistoj. Al la urbodomo invitis nin la urbestro je koncerto kadre de Festivalo de Eltrovita muziko, kaj regalis per jubilea, grandega torto por 200 personoj.

La Urba Kulturcentro estis tre komforta kongresejo. Krome, ses ĝiaj ensembloj infanaj kaj junularaj, kiuj dum kelkaj monatoj prepariĝis al la kongreso, prezentiĝis en ĝia kultura programo, interalie, per kantoj en Esperanto. La plej junaj infanoj prezentis kortuŝe *Malgrandan Princon*...

Marian Zdankowski gvidis du kvizojn: la unuan pri Esperanto kun helpo de olŝtinanoj, kaj la duan pri la gastiganta regiono kun helpo de loka turisma gvidantino Anna Totoń. En ambaŭ konkursoj venkis bjalistokanoj: Przemek Wierzbowski en la unua kvizo, kaj Nina Pietuchowska en la dua. Ambaŭ venkintoj gajnis senpagan partoprenon en la septembra ekskurso en la Eŭropa Parlamento.

La kongresa temo estis “Civitana aktiveco de esperantistoj”. Per tiu ĉi kongreso ni konfirmis la gravecon de la ekstera agado de esperantistoj en la loka socia vivo, “arto labori kune”; sed la arto povas esti realigata je diversaj niveloj kaj kampoj. En Nowy Sącz ni komprenas ĝin ĝuste tiel. Tial ni ricevas por nia agado komprenon kaj subtenon de lokaj aŭtoritatoj kaj de la socio, tial dum la tuta kongresa semajno kaj post ĝi oni skribis, parolis pri la okazintaĵo, fotis kaj filmis la kongreson.

En la Ĝenerala Kunsido de la Pola Esperanto-Asocio (PEA) partoprenis 27 PEA-delegitoj. Ili liberigis la antaŭan Ĉefan Estraron de PEA el la taskoj kaj elektis la novan teamon, kiu gvidos la asocion dum 2011–2014.

La nova Ĉefa Estraro de PEA estas tute nova. La funkciojn dividis inter si gejunuloj: Arkadiusz Zychewicz, altlerneja instruanto de informadiko, estas prezidanto; Paweł Fischer Kotowski, studento pri scienca informado, iĝis sekretario; Anna Magier, organizantino de kulturaj aranĝoj, estas kasisto; Agnieszka Mozer reprezentas la junularan asocion PEJ en la estraro.

Aldoniĝis al la gejunuloj Barbara Pietrzak, Władysława Kujaczyńska, Mirosława Mazur kaj Zofia Śmistek.

Halina Komar



La nova prezidanto de PEA, **Arkadiusz Zychewicz**, afable respondis nian demandon pri la programo, kiun la nova gvidantaro de PEA realigos dum sia mandato:

«Niaj planoj estas plibonigi enajn informadojn per tradiciaj iloj kaj per interreto ĉefe uzante la retejon esperanto.pl. Ankaŭ ni volas fari ŝanĝojn en statuto por ke PEA ricevu la statuson de Organizaĵo de Publika Utilo. La statuso garantias altan kvaliton por organizantoj, kiuj volus kunlabori kun ni, kaj por decidantoj pri fondusoj de Eŭropa Unio. La fondusoj

vigligos agojn de la asocio kaj ebligis pli bone realigi la ĉefan celon de PEA, kiu estas instruado de Esperanto kaj informado pri Esperanto.»

Kunsidas la Estraro de UEA

Ekde sia elekto en Havano la Estraro de UEA praktike konstante kunsidas rete, sed la unuan realan kunsidon ĝi havis 15–17 apr en la Centra Oficejo en Roterdamo. Ĝenerala direktoro Osmo Buller povis ĉeesti pro malsano nur mal-longe en du tagoj. Lin anstataŭis oficisto Pasquale Zapelli, kiu partoprenis tut-tempe, same kiel redaktoro Stano Marček. La prezidanto de ILEI Stefan MacGill ĉeestis la tutan unuan tagon, dum la volontulo de TEJO Manuela Ronco kaj la oficistoj de la Kongresa Fakoj Clay Magalhães kaj Tobiasz Kazmierski ĉeestis dum la traktado de iliaj laborkampoj.

Dum la pasintaj monatoj la Estraro faris jam multajn decidojn rete. Tiun eblecon havos ankaŭ la Komitato, kiu tiucele ricevos en Kopenhago proponon pri ŝanĝo en la Komitata Regularo. Jam pli frue la Estraro aprobis novan dokumenton pri la gvidlinioj por la redaktado de la revuo *Esperanto*. Poste la Estraro proponos novan kontrakton al la nuna redaktoro de la revuo.

La Estraro ricevis raporton pri la ĝisnuna laboro de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, kiu diskutis pri radikalaĵoj ŝanĝoj en la strukturo kaj funkciado de UEA. La estraranoj decidis unuope kontribui al la diskuto en la komitata retlisto. Ili trovis siajn vidpunktojn tre proksimaj inter si sed ne facile resumeblaj en komuna estrara opinio-esprimo, ĉar la raporto venis mallonge antaŭ la kunsido. Ili do konkludis, ke en la komitata listo ili povos plej utile prezenti siajn vidpunktojn kaj evidentigi la komunecon de siaj pensoj.

La Estraro ricevis ankaŭ raporton pri la progreso de la renovigo de la ĉefa retejo de UEA.

Kvankam pasintjare UEA perdis multajn membrojn, la spezkonto de 2010 estas ekvilibra jam por la kvina sinsekva jaro. La ĝisnuna evoluo indikas, ke la enspezoj kovros la elspezojn ankaŭ ĉi-jare. Pli problema povos esti la jaro 2012. Propono pri buĝeto por tiu jaro ankoraŭ ne pretas pro la malsano de la ĝenerala direktoro, sed la Estraro fidis, ke ankaŭ ĝi estos ekvilibra kun konservo de la nuna laborforto de la CO. La Estraro aprobis ankaŭ du subvenciojn el la ĉi-jaraj rimedoj: 2500 eŭroj al ILEI kaj 700 eŭroj al Eŭropa Esperanto-Unio por agado ĉe la septembra Ekonomia Forumo en la pola Krynica.

En la dua tago de la kunsido de la Estraro de UEA ankaŭ tiu de ILEI

komencis sian kunsidon en la Centra Oficejo. La samtempa ĉeesto de ambaŭ estraroj donis utilan okazon por interkonsiliĝi pri komunaj temoj. Post la fino de la kunsido de la Estraro de UEA, Claude Nourmont, estrarano pri edukado, partoprenis kiel observanto la kunsidon de la estraro de ILEI.

GK UEA

Bukedo je la Holokaŭsta Tago

La 2an de majo, je la Holokaŭsta tago, okazis la memor-ceremonio en Jad Vašem, Jerusalemo. Same kiel en la lastaj kvin jaroj, inter la cent bukedejoj (i. a. de prezidento Peres, ĉefministro Netanjahu, vicestro de la Kneset kaj ĉefo de Soĥnut Natan Ŝaranski kaj urbestro de Jerusalemo Nir Barkat) estis la bukedo de Esperanto-Ligo en Israelo kaj de Universala Esperanto-Asocio.

La bukedo estis metita de Malka Zemeli kaj Amri Wandel. Estis interesa koincido, ke la sekva en la bukedejo estis la bukedo de judoj el Bjalistoko, kaj la antaŭa estis prezentita de Cvi Sefet de la urbo Slonim, kies parenco estis Josef Kohen Cedek, unu el la pioniroj de Esperanto en Jerusalemo.

Post la anonco de la bukedo de ELI, alparolis nin profesoro de la Universitato Ben Gurion, kiu metis la bukendon nome de la Libiaj judoj, kaj rakontis ke de la infanaĝo li interesiĝas pri Esperanto sed ne sciis ke troviĝas esperantistoj en Israelo. Sekve Malka legis en la ceremonio en la palaco de nomoj la nomojn de la familianoj de Zamenhof murditaj en la Holokaŭsto.

Amri Wandel

Niaj Israelaj samideanoj omaĝas per bukedo al la viktimoj de la Holokaŭsto.



Verkista Renkonto en Slovenio

La 45a Internacia Verkista Renkonto de PEN Internacia okazis 5–7 maj en Bledo (Slovenio) kun la temo “Bibliodiverseco kaj la estonto de la verkado”.

Inter la reprezentantoj de tridek da literaturoj, la Esperantan reprezentis c-ano Giorgio Silfer, dramverkisto, publicisto kaj kritikisto.

La evidenta asonanco inter bibliodiverseco kaj biodiverseco kondukis la debaton al ĝenerala bedaŭro pro la stato de la libroeldonado kaj zorgemo pri la estonteco de beletro en la mondo de la globaliĝo. En tiu bedaŭro situas la ĉagreniĝo pro la morto de lingvoj.

Diference sonis la interveno (franc-lingva) de la delegito de la Esperanta PEN-Centro, kiu atentigis ke la debato estis nur dudimensia: eblas kaj endas emfazi, ke la novaj teknologioj revigliĝis la civilizojn de la skribo kaj lego, kompare kun tiu de la bildo, kaj krome akcelis pensliberon kiun la libro ne plu kapablas garantii; fakte la cenzuro ne plu timas la librojn, kiel antaŭ jarcento aŭ iom malpli, sed interreton — sen kiu interalie ne okazus la jasmena revolucio.

Silfer ankaŭ atentigis, ke la morto de lingvo estas natura fenomeno, pri kiu endas bedaŭri, se ne postrestas atentinda kultura heredaĵo: la greka kaj la latina kaj la hebrea (ĉi-lastaj resurektinta) estas mortaj lingvoj, sed esencaj por la homa civilizo, kaj daŭre kontribuantaj al ĝi. La intervenoj de Giorgio Silfer estis tre aplauditaj.

Esperanto-poezio estis prezentita en publika deklamado ĉe loka kultura societo, kie Marko Kravos, prezidinto de la Slovena PEN kaj mem poeto, reĝisoris poezian vesperon, dum kiu sonoris la greka, la franca, la slovena kaj la Esperanta. Dum la gekolegoj prezentis proprajn poemojn, Giorgio Silfer omaĝis al la Esperanta kandidatino por la literatura Nobel-premio, Marjorie Boulton, per deklamado de ŝia poemo *Memnon*, inspirita de legendo el la homera tempo. La deklamado (la sola farita parkere, kio ege plaĉas en la danubaj landoj) tre pozitive impresis la publikon.

Kadre de la konkluda ronda tablo Silfer intervenis pri “La bildo de la fremdulo en la esperanta literaturo: vojo al paco”. Li analizis tri kazojn: la verkisto de landlimo (Raymond Schwartz), la elmigrinta aŭtoro (Ferenc Szilágyi), la ekzilita intelektulo (Ivo Lapenna).

HeKo

FRINGOJ en kastelo Grezijono

Kvaran fojon disvolviĝis la Festa Renkonto **IN**ternacia de **GeknabOJ** inter la 16a kaj la 23a de aprilo. Ĝi kunigis homojn el ses landoj ĉirkaŭ riĉa programo kaj sub bela sennuba ĉielo. La somereca temperaturo ebligis al la 17 gejunuloj ĝui eksterajn ludojn — dankon Klara, pro dinamika animado — kaj ekskursojn al apudaj vizitindaĵoj.

La programo de la aktivajtoj kaj sekve, ankaŭ de la fina publika spektaklo, harmonie miksis influojn de la diversaj grupetoj: ĉeĥaj tradiciaj dancoj kaj kutimoj, viglaj teatraĵo kaj kantoj el Portugalio, amuza pantomimo laŭ juda kanzono (interpretita de Olivier Tzaut) el Orienta Eŭropo, teatraĵetoj pri tutmonde konata fabelo *La ora fiŝeto*, popola legendo pri la urbo Česká Třebová, kaj sunplenaj brazilaj kantoj. Ni ankaŭ ĉiuj admiris la ses magiistojn, kies iluziojn enscenigis Ĵerar'. Kaj ni certe ne forgesos la himnon de la itala mezlernejo C. Cavour (Modeno) "Insieme se può" (Kune kun eblas) kun refreno korse kantita Esperante, itale, france, ĉeĥe, portugale, ruse, kaj eĉ gest-lingve sub gvidado de la 17-jara Elisa el Italio.

Indas informi ĉiujn Esperanto-artistojn pri la grava pliboniĝo de la spektaklaj kondiĉoj en la Zamenhof-salono de Grezijono, dank' al Yvo Couturier, kiu akurate kaj oportune konstruis veran scenejon, kaj al Frederik Lauriol kiu instalas la scenej-lumojn.

Dank' al artikoleto kiu anoncis la spektaklon en la regiona gazeto *Courrier de l'Ouest*, tamtamo de lokaj esperantistoj kaj afiŝoj disvastigitaj de Yvet' Corvaisier, la 22an de aprilo venis kontentiga nombro da spektantoj, kiuj kun intereso ankaŭ vizitis nian ekspozicion pri la temo "Rakontoj el ĉiuj landoj". Ĝi prezentis, krom kvardekon da esperant-lingvaj porinfan-libroj el plej diversaj originoj, kontribuojn (tekstojn, desegnaĵojn, fotojn) de lernejoj el Ĉeĥio, Pollando, Italio kaj Brazilo — kie Esperanto estas instruata. La ĵurnalisto kiu intervjuis nin lunde, revenis vendrede por raporti pri la spektaklo en la sama gazeto.

Dankon al vi, Zdenka, Ermanno, Luís, Luigia kaj Vittorio, Klára, Maria de Lurdes, Francisca, Bertrand, Lucette, Phil kaj Gérard. Ni formis sukcesan teamon. Sen via partopreno, FRINGOJ ne povus okazi, sed vi pravigis la himnon: "Insieme se può!".

Elisabeth Barbay



FRINGOJ okazas ne nur en la Kastelo, sed ankaŭ ekstere.

ICH: Oficiale agnoskita kurso

De la 21a ĝis la 25a de marto 2011 dum la "laborforpermesa semajno" okazis en la Esperanto-urbo Herzberg oficiala klerigado, organizita de la regiona popola altlernejo en Osterode (KVHS).

Dum la lastaj 40 jaroj en Germanio ne okazis tiaspeca altnivela kaj agnoskita Esperanto-kurso. Ĝi estis agnoskita de la Ministerio de Edukado, kaj pro tio ĉiuj partoprenantoj ricevis pagitan ferion, forpermeson de siaj laborejoj, kaj je la fino de la kurso ili ricevis oficialan atestilon pri pluklerigado, kiu aldoniĝas al la personaj aktoj.

La lernado en la 40-hora kurso okazis en du grupoj: la progresintojn instruis Zsófia Kóródy, la komencintoj lernis sub la gvido de Peter Zilvar.

Ne mankis gaja etoso kaj ekskursoj.

ICH

Printempe: Harpoj kaj pupteatro

Entute 24 gastoj venis al la dua renkontiĝo *Printempe* organizita de EsperantoLand 18–25 apr en pejzaĝa domo apud la vilaĝo Baasem en la Eifel-regiono, Germanio. Feliĉe la partoprenantaro estis internacia kaj ni preskaŭ ekskluzive parolis en Esperanto.

La programo estis varia kaj pro la ĉiutaga sunbrilo ni povis pasigi multan tempon ekstere: promenante en la ĉirkaŭo kaj ekskursante. Pro la samtempa ĉeestado de harp-orkestro ni povis aŭskulti ties koncerton, bele aranĝitan ekstere apud la domo. Kaj, kompreneble, dum la Paska dimanĉo ni amuziĝis serĉante ovojn.

Endome ni plurfoje ĝuis banadon en

la naĝejo kaj aŭskultis prelegojn. La arta kulmino de la semajno estis prezento de la lerta puĉludisto Christoph Frank *Aleksandro kaj la mekanika muso*. Kaj kiel ĉe ĉiu Esperanto-renkontiĝo ni multe ĝuis babiladon.

Lu Wunsch-Rolshoven,
EsperantoLand

PSI: Varia programo

La 27a Printempa Semajno Internacia (PSI) okazis inter 22–29 apr 2011 en la urbeto Waldfischbach-Burgalben inter Kaiserslautern kaj Pirmasens. Partoprenis 120 personoj el 12 landoj. Inter ili estis 40 infanoj kaj junuloj.

Zsófia Kóródy (komisiito de GEA por instruado) skribis:

«La tradicia aranĝo de GEA allogis per varia programo: interesaj prezentaĵoj, prelegoj, aktiva manlaborado, paska ovoserĉado, muziko, dancado, pupteatraĵo, ktp. El instrua vidpunkto aparte menciindas la viglaj Cseh-metodaj lingvokursoj de Sabine Trenner por infanoj kaj plenkreskuloj. Ne mankis programeroj por naturamantoj: migrado, ekskursoj al la regiono, vizito de muzeoj. Novaĵo estis la bone vizitita Movada Foiro, bunta prezento de Esperanto-eventoj, eldonaĵoj, varbiloj. Por multaj personoj estis grava momento la internaciaj KER-ekzamenoj. Paralele okazis KER-ekzamenoj en Sète, Francio, kaj grupo de ekzamenitoj povis submeti sin al lingva testado en niveloj B1, B2 kaj C1. Dum PSI ok personoj ekzameniĝis en B2 kaj C1, ĉiuj sukcese trapasis la parolan parton, la korektado de la skribaj taskoj ankoraŭ daŭras.»

Jörg Gersonde



Libra ondo en Bjalistoko

La 2an de aprilo 2011 en la ĉefstrato de Bjalistoko esperantistoj iniciatis renkontiĝon de ŝatantoj de libroj. Kiel vi jam scias, en la naskiĝurbo de Zamenhof funkcias publika Esperanto-Libraro — filio de la ĉefa regiona Podlažia Libraro en la centro Zamenhof. Loka esperantistaro ne nur prunteprenas tie Esperanto-librojn, sed ankaŭ partoprenas diversajn aranĝojn tie.

Unu semajnon pli frue nia grupo de entuziasmoj vizitis ĉiujn vendejojn en la strato Lipowa, proponante pendigi sur la vitrinaj afiŝojn pri la *Libra Ondo*. En lernejoj, publikaj kaj studentaj bibliotekoj ni pendigis 250 afiŝojn. Kaj responde venis lernejoj, junuloj, pensiuloj.

Laŭplane ŝatantoj de libroj kreis je la 12.00 horo por momento vivĉenon, kiu estos ligata ne man-en-mano, sed je la libro, kiun ĉiu kunportis. Gepatroj, kiuj venis kun malgrandaj infanoj, ricevis

donace de ni kvarlingvajn porinfanajn librojn *Avo Paŭlo* aŭ *Kato Koloro*.

Ĉe kvar grandaj vendejfenestroj estis organizita interŝanĝo de alportitaj libroj. Kelkcent el ili ŝanĝis siajn posedaĵojn. Por popularigi Esperantajn librojn, ni kreis sur du grandegaj tabloj surstratan ekspozicion de libroj kaj gazetoj. Lokaj amaskomunikiloj kun simpatio subtenis nin.

Elżbieta Karczewska

Kato (kodo) por toleremo

Kun plezuro ni informas, ke la kato Koloro ellernis Esperanton kaj daŭrigas sian propran vivon. La projekto *Kodo (kato) por toleremo*, realigita en la centro Zamenhof en Bjalistoko surbaze de la fabeleto de la hispano Moises Gutierrez Raimundez, estas daŭrigata fare de Bjalistoka Esperanto-Societo, lernantoj kaj instruistoj de la 7a liceo en Bjalistoko.

Danke al financa helpo de la urbestro, la 14an de aprilo, okaze de mortodatreveno de Doktoro Esperanto, ĉe la monumento Zamenhof renkontiĝis admirantoj de la universala lingvo maskitaj per koloraj, kataj maskoj.

Ĉi-jare nia aranĝo havis la titolon: “Ludoviko Zamenhof okulkuracisto kaj esperantisto — por infanoj”. Krom esperantistoj venis 150 infanoj el du infanĝardenoj, reprezentantoj de la 51a bazlernejo Ludoviko Zamenhof kaj de la 1a urba liceo. Inter ni estis Moises Gutierrez Raimundez el Hispanio kaj Andrej Vaškeviĉ el Bjelorusio. Ni tradicie disdonis 250 flavajn jonkvilojn al partoprenantoj. Kune kun la vicurbestro de Bjalistoko Aleksandro Sosna ni metis florojn ĉe la monumento.

Posttagmeze en la Centro Zamenhof estis ege brue. Komence blinda esperantista aktoro Rafał prezentis la fabelon *Kato Koloro* laŭ la pola brajla teksto. La fabeleto estis eldonita kvarlingve (pole, angle, germane kaj Esperante) kun aldonajo: pola versio en brajlo. Reliefa, peltega kovrilpaĝo donis ŝancon al blindaj kaj malbone vidantaj personoj rekonii siluetojn de kato. 200 maskoj kaj 300 kovrilpaĝoj estos faritaj kadre de metiejo en nia Esperanto-klubo.

Junularo el la arta klaso el la 7a liceo preparis por blinduloj multipapan libron en skatolo kun apartaj, reliefaĵoj. La teatra klaso de la liceo prezentis la teatraĵon pri la kato Koloro. La intrigo de la fabelo estis prezentita en mallumejo, por ke la publiko imagu la sentojn de la blinda kateto. Post la teatraĵo la aŭtoro mem prezentis sin kaj disdonis 200 fabeletojn kun sia subskribo.

Andrej Vaškeviĉ el Grodno rakontis pri la kvarjara restado tie de Ludoviko Zamenhof kaj pri Esperantaj spuroj en la urbo. Fine okazis koncerto de junaj klezmeroj parte en Esperanto parte en la jida lingvo, kaj nostalgia koncerto de novaj kaj malnovaj Esperanto-kantoj de Georgo Handzlik.

“Toleremo por aliaj ol ni” estas unu el ĉefaj sloganoj de la ideo de Esperanto. La societo *Ni serĉas Pollandon*, akceptinte la sloganon, produktis kaj disdonis senpage dum nia aranĝo cent sondiskojn kun la libro *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda*.

Nun la kato Koloro havas novajn vojaĝplanojn: komence prezenti sin en la Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Nowy Sącz kaj poste viziti la UK-on en Kopenhago. Ĉiam kun nemalhavebla akompananto el Bjalistoko.

Ela Karczewska



Kristo Resurektinta!

La 24an de aprilo, je la Pasko, kiun ĉi-jare samtempe festis la kristanoj laŭ la Julia kaj Gregoria kalendaroj, post sia tradicia mesaĝo “Urbi et Orbi” en la placo Sankta Petro, Papo Benedikto la 16a bondeziris en 65 lingvoj. En Esperanto li diris: “Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta!”

La bondeziron en Esperanto (post la samoa kaj antaŭ la guarania) akceptis ĝojoplena kriego de la esperantistoj kiuj ĉeestis sur la placo Sankta Petro por la 20 sinsekva fojo, portante la liter-paneojn kun la vorto “Esperanto”. Malkiel dum la antaŭaj jaroj, ĉi-foje la rekta monda televida elsendo ne montris la esperantistojn dum la Esperant-lingva bondeziro de la Papo, sed dufoje montris ilin dum la fina beno.

Laŭ www.ikue.org

Altnivele en UAM

La 21–22an de marto okazis en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań (Pollando) internacia konferenco “Inter la lingvoj de Centra-Orienta Eŭropo”, kies oficialaj lingvoj estis: pola, hungara, slovaka, ĉeĥa, angla kaj Esperanto.

La prelegoj kaj diskutoj okazis en kvar sekcioj: lingvopolitiko, interkultura komunikado, informteknologio en lingvoinstruado kaj kulturaj rilatoj en la landoj de la regiono (ĉefe Viŝegradaj landoj). En la unua sekcio prelegis Jozef Reinart pri lingvopolitiko en EU kaj pri “Platformo de civila societo por multlingvismo”, Ilona Koutny pri “Rolo de la planlingvo Esperanto en Mez-Orienta Eŭropo”, en la tria sekcio Marek Blahuš pri “Lernu.net” kaj Petro Baláž pri la slovaka reta instruprograme baziĝanta sur “Lernu.net”.

La 30an de marto, kadre de la ĉiujare organizata Festivalo de Scienco kaj Arto, okazis duonhora prezento de la temo: “Internacia komunikado kaj la internacia lingvo Esperanto” en la Lingvistika Instituto de UAM, kie la alvenintaj mezlernejoj kaj aliaj interesigantoj povis ekscii informojn pri komunikado en la Eŭropa Unio, konkursi pri diversaj lingvoj kaj ekhavi bazajn informojn pri Esperanto dank’ al la esperantistaj instruistoj de la instituto: Michael Farris, Chung-yi Wang, Ilona Koutny kaj du gestudentoj: Agnieszka kaj Kristoforo.

Ilona Koutny



Esperantistoj denove videblaj sur la placo Sankta Petro (Foto el www.ikue.org)

Esperantologio antaŭ defio

22–23 sep 2011 ĉe la universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań okazos la dua Interlingvistika simpozio “Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defioj de la 21a jarcento”.

La ĉefaj temoj/sekcioj:

— Ĉu la Esperanto-movado respondas al la defioj de la nuntempo?

— Moderna lingva priskribo de Esperanto

— Modernaj metodoj en instruado de Esperanto

— Nuntempa Esperanto-literaturo

— Novaj planlingvaj projektoj, konstruitaj lingvoj en la interreto.

La Interlingvistikaj Studoj de UAM invitas ĉiujn interesatojn partopreni kaj kontribui al la simpozio, kiu okazos tuj post la interlingvistika sesio (kiu restartos kaze de sufiĉe da kandidatoj) kaj antaŭ la tradicia kultura semajnfino ARKONES (23–25 sep 2011) same en Poznań.

Publikigo de recenzitaj kontribuajfojoj estas antaŭvidata.

Aliĝu ĉe interlin@amu.edu.pl

Ilona Koutny

La 44a Konferenco de ILEI
Kopenhago, 17-23 julio 2011

Post la neforgesbla semajno en Kubo, ILEI denove konferencos en Eŭropo. Ĉiujare alia kontinento: 2006 – Italio, 2007 – Japanio, 2008 – Benino, 2009 – Pollando, 2010 – Kubo, 2011 – Danio, 2012 – ni planas denove Azion. Pli da informoj: <http://www.ilei.info>

Kaj ĉiujare la tradicia programo: kleriga, kultura, scienca, organiza, turisma, kaj ĉiujare io nova en la intima rondo de esperantistaj instruistoj

- simpozio kaj seminarioj
- prelegoj kaj paneldiskutoj
- ekskursoj kaj bankedo
- komitatkunsido
- lingva festivalo
- distraj vesperoj

Konferenca temo:
Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado

Simpozio: 22-23 julio

Aliĝilo kaj pliaj informoj:
<http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>
info@ilei.info

Eventoj

En Bohemia paradizo

Jam la 32a lingva seminario en la vilaĝo Skokovy okazis 11–16 apr 2011. Pri ĝi skribis Aleš Vávra: «En paradiza naturo, kie vulpoj deziras “bonan nokton” kaj kie leontodoj salutas matene “bonan tagon”, mi ĉerpis paradizan, bonan akvon de Avulino el Skokovy [el konata legendo, – J. D.]».

La seminarion preparis Pavel Nechvíle kaj Ludmila Srbová. La interkona vespero, krom kutimaj informoj, enhavis sciigon pri la agado de la partoprenantoj kaj vere oni devas aprezi la laboron de ĉiuj, kiuj dum la vintro ne ripozis.

Grave estas, ke venis novaj adeptoj, kiuj surprizis per siaj entuziasmo kaj progreso, danke al Viktor Dvořák, kiu instruis ilin pere de la Ĉe-metodo. Busa ekskurso al la subĉiela muzeo en Přerov nad Labem malgraŭ la venta vetero kontentigis la ĉeestantojn.

Ĉiun antaŭtagmezon okazis instruado en tri grupoj. Merkrede posttagmeze vizitis kelkaj partoprenantoj la vilaĝestron en Žiár kaj proponis al li kunlaboron: traduki Esperanten la interretajn paĝojn pri Skokovy kaj por la loĝantoj en proksimaj vilaĝoj eblan partoprenon de la “rondeto de lertaj manoj” dum la venonta seminario.

Vespere rakontis al ni Peter den Breems el Nederlando pri sia vojaĝo al Peterburgo tra Bjelorusio. Stano Marček dumvoje el Slovakio al Roterdamo ofereme alportis la broŝuron *Malkovru Esperanton*, kiun tradukis nia kara Miladka Kolářová, kiu tiel sopiris ĝisvivi la seminarion kaj saluti amikojn...

La vespero kun la agrabla voĉo de Stano estis tre interesa. La ĵaŭda vespero devis okazi en la granda manĝejo, ĉar kun la vic-prezidanto de ĈEA Petr Chrdle venis “haremo” de liaj ok lernantinoj. Li prelegis pri la Esperanta movado ĉe ni.

La vendreda vespero estis adiaŭa kaj agrabla. La programon ornamis kaj kompletigis kant-koruso de partoprenantoj, kies dirigento kaj pianludantino estis Jana Brancuzská, unu el tri novaj ĉeestantoj de Skokovy. Tiel la restado estis post certa paŭzo denove muzik- kaj kantplena. Ĉiuj partoprenis, neniu hezitis prezenti sin serioze aŭ amuze. La venonta seminario okazos en oktobro 2011. Venu admiru la kolorriĉan naturon de la Bohemia paradizo. Vi estas elkore invitataj.

Jindřiška Drahotová

UEA: La membraro malkreskas

Laŭ la oficiala statistiko, aperinta en la aprila numero de la revuo *Esperanto*, la membraro de UEA grave malkreskis pasintjare. En 2010 estis entute 5288 individuaj membroj en 120 landoj, t. e. 425 membroj malpli ol en 2009. Kiel oni povis atendi, en la kongreslando Kubo la membraro kreskis plej multe (+111), sed tiun kreskon nuligis la malkresko en Pollando (-118), kiu gastigis UK en la antaŭa jaro. Rimarkindaj malkreskoj okazis ankaŭ en Ruslando (-77), Francio (-64), Japanio (-36), Ĉeĥio (-34) kaj Germanio (-33). Francio plu restas la lando kun plej multe da individuaj membroj de UEA (547). Sur la dua loko same tradicie restis Germanio (506).

Malkreskis ankaŭ la nombro de aligitaj membroj, kiuj estas tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Ilia nombro estis 10527 (-2078). La plej drastaj faloj estis en Hungario (-1440) kaj Francio (-363). La tuta membraro de UEA en 2010, t. e. individuaj kaj aligitaj membroj sume, nombris 15815 (-2503).

324 individuaj membroj estis malpli ol 30-jaraj. Sekve ili estis samtempe individuaj membroj de la junulara sekcio TEJO (-112). Krome 1734 el la aligitaj membroj estis malpli ol 30-jaraj (-171). Sekve TEJO havis entute 2058 membrojn (-283).

La revuo *Esperanto* havis pasintjare 3508 pagitajn abonojn (-257) kaj la revuo *Kontakto* 597 (-138).

GK UEA

UEA membriĝis en Infoterm

10 maj 2011 Universala Esperanto-Asocio subskribis interkonsenton pri kunagado kun Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio. Per tio UEA fariĝis membro de Infoterm, fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstra Normiga Instituto (ASI). Infoterm celas i. a. interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp. ĉefe en la kampo de terminologio.

Infoterm devenas el la terminologia esplorcentro, kiun fondis kaj longe prizorgis Eugen Wüster, esperantisto kaj fondinto de la moderna terminologia scienco.

Pri la rilatoj de UEA kun Infoterm kaj la Teknika Komitato TC37 de ISO respondecas nova komisiito, Mélanie Maradan el Svislando.

GK UEA

1306 aliĝis al Kopenhago

Je 13 maj 2011 entute 1306 kongresanoj el 67 landoj aliĝis al la 96a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Kopenhago 23–30 jul. Sekve iom pli ol du monatojn antaŭ la UK la nombro de aliĝintoj jam superas la definitivan nombron de la pasintjara UK en Havano (1002) kaj tiun de la antaŭa UK en Kopenhago en 1975 (1227).

Plej multe da aliĝoj venis el Francio (165). Pli ol cent aliĝintojn liveris ankaŭ Germanio (131), kaj tiun limon baldaŭ superos Japanio, de kiu ĝis nun estas 98 aliĝintoj. La gastiganta lando reprezentigas per 84 aliĝoj. Pli ol 50 aliĝoj estas el Pollando (68), Nederlando (59), Brazilo (57), Ruslando (55), Italio (53).

GK UEA



Radom: esperantistoj premiitaj

Komence de la nuna jaro la urbestro de Radom anoncis konkurson *Bonaj Praktikoj 2010*. La konkurso estis direktita al la urbaj neregistaraj organizaĵoj kaj societoj. Partoprenis 17 grupoj, inter kiuj ankaŭ la Radoma filio de PEA.

La 15an de marto 2011 okazis en la urba oficejo granda solenaĵo, dum kiu la ĵurio de tiu ĉi konkurso anoncis la rezultojn kaj atribuis premiojn. La Radoma PEA-filio ricevis altan, duagradan premion (kun fotilo kiel aldonaĵo). Ni estas tre kontentaj pro tio, des pli, ke tiel grandan agrablaĵon kaj distingon ni atingis unufoje de la urboflanka flanko.

Antoni Dorosz



Eventoj

25 diplomitoj en Burundo

En aprilo la svisa instruistino Mirejo (Mireille) Grosjean la nuna prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono kaj komitatano de UEA vizitis Burundon.

Kvar unuajn tagojn Mirejo pasigis en la ĉefurbo Buĵumburo, kies ŝi estis intervjuita de kvar radiostacioj (Radio Salama, Radio Bonesha FM, Radio Rema FM, Radio Nderagakura) kaj de la televido Salama. Ŝi havis utilan viziton de la junulara ministerio, renkontiĝis kun la prezidanto de la Nacia Asembleo (parlamento) de Burundo, kun la “Ombudsmano”, kaj kun aliaj gravuloj.

Poste ŝi vojaĝis al la urbo Rumonge, kie ŝin bonvenigis la prezidanto de la landa asocio ANEB Jérémie Sabiyumva kaj aliaj partoprenantoj de Esperanto-seminario, financita de la fondaĵo de Hans Bakker. Ŝi transdonis al ANEB vortarojn, poŝamikojn kaj ekzempleron de PIV, kiujn donacis svisaj kaj francaj esperantistoj.

Dum la kvin seminarioj tagoj Mirejo instruis la gramatikon, historion kaj kulturon de Esperanto, prezentis gravajn verkistojn kaj pedagogojn. Ŝi kaj esperantistoj, venintaj el aliaj urboj, ekskursis en Rumonge kaj profitis la restadon por viziti la terenon de ANEB, ricevitan pro la klopodoj de Johan kaj Svetlana Derks el Nederlando, kiuj kolektas la monon por la konstruo de la biblioteko.

Post la intensa lernado okazis tritaga ekzamenado laŭ la reguloj de ILEI/UEA. Aliĝis 18 kandidatoj por la meza nivelo kaj 23 por la elementa. Post la unua etapo gramatika restis respektive 14 mezniveluloj kaj nur 13 elementuloj, al kiuj aliĝis la 4 mezniveluloj kiuj ne sukcesis la meznivelan ekzamenon. En la ekzamena komisiono estis Mirejo, Jérémie Sabiyumva kaj Japhet Bayori (la antaŭa prezidanto de ANEB).

Poste dum kvar horoj en ĉiu nivelo la kandidatoj plenumis la restantajn ekzamenojn: lega kompreno, aŭskulta kompreno, testo pri kulturaj konoj, verkado de eseo.

La lastan tagon Jérémie Sabiyumva dankis al Mirejo Grosjean pro la granda kaj valorega laboro, kaj gratulis ĉiujn sukcesintojn de la ekzamenoj; Japhet Bayori kuraĝigis tiujn, kiuj ne sukcesis.

Mirejo dankis kaj gratulis ĉiujn ĉeestantojn kaj diris, ke ŝi rajtas fieri ĉar multaj esperantistoj sukcesis la ekzamenojn: 12 en la meza kaj 13 en la elementa nivelo, kiuj ricevis la atestilojn.

Hasano Ntahonsigaye

2–90-jaruloj kongresis en Israelo

En la 12a Israela Kongreso, okazinta komence de aprilo, renkontiĝis pli ol 40 esperantistoj, el ili sep eksterlandanoj. La Kongreso okazis en la urbo Cezareo, kaj ĝin sekvis kvartaga postkongresa ekskurso al la Morta kaj Ruĝa maroj.

La plej juna partoprenanto estis la dujara denaska Omer de Tel Avivo, kaj plej aĝis 90 jara Rolf Bergh el Norvegio. La partoprenantoj ekskursis al la muzeo de neleĝa enmigrado, kiu aŭdvide rakontas la heroan kaj kortuŝan historion de la juda enmigrado al Palestino post la Holokaŭsto (kiel la fama ŝipo *Exodus*), spite de la brita barado.

Sekve oni vizitis la naturan kaj arkeologian rezervejon “rivero de krokodiloj”, kie oni ne vidis krokodilojn (krom nacilingve babilemajn esperantistojn), sed restaĵojn de antikvaj akvo-kondukiloj kaj mueliloj. Laste oni ekskursis al la antikva romi-tempa restaŭrita urbo Cezareo, revenante al la tempo de Kristo kaj la reĝo Herodo.

La kleriga programo enhavis prelegojn pri “Kulturaj aspektoj en interhoma komunikado” (Kristin Tytgat el Belgio), “La analiza skolo” (Herman Behrmann, Germanio) kaj “Esperanto en Svislando, de Privat ĝis Piron” (Bruno Graf el Svislando). Okazis ankaŭ debato pri la temo “Esperanto en la ombro de la angla” gvidita de Amri Wandel, la tradicia kvizo de Josi Ŝemer, naskiĝtaga festo de Jan el Ĉeĥio, pliaj prelegoj kaj sociaj ludoj.

La eksterlandaj gastoj partoprenis la jam tradician postkongreson ĉiĉeronitan de Amri. Oni banis sin flosante en la Morta Maro, la plej sala kaj malalta maro de la mondo, kaj apude vizitis Kumran-on, kie estis trovitaj la antikvaj rulaĵoj de la Morta Maro, la belan oazon Ein Gedi, Masadon, la lasta ribelejo kontraŭ la romianoj.

Survoje al la plej suda urbo de Israelo, Eilat ĉe la Ruĝa maro, oni grimpis ŝnur-eskalojn en la aventura dezerta kanjono Barak, subakve vidis la koralrifojn de la Ruĝa maro, kaj migradis tra la kolora Ruĝa kanjono. En la lasta tago oni vizitis Jerusalemon, aparte la malnovan urbon, kaj la Muron de Larmoj — la plej sankta loko por la judoj.

Fotoj pri la Kongreso videblas ĉe <https://picasaweb.google.com/104206151883892331911/IsraellaKongreso2011#> kaj de la postkongreso ĉe <https://picasaweb.google.com/104206151883892331911/IsraellaPostKongreso2011#>

Amri Wandel



Inter la 2-jarulo kaj 90-jarulo estas tuta aktiva generacio (A. W.)

Amu kaj instruu vin!

De 29 apr ĝis 1 maj en Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, okazis la 5a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj (BRES), organizita de Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj (BAES).

Pri la ĉeftemo *Spiritistoj, amu kaj instruu vin!* prelegis prof. Affonso Soares, direktoro de la Departemento pri Esperanto de Brazila Spiritisma Federacio (BSF). Alparolis la pli ol 50-personan publikon Nestor João Masotti, la prezidanto de BSF, la plej grava spiritisma organizaĵo en la tuta mondo.

La prelega programo estis ampleksa: *La laboristoj de la lasta horo* (Elmir dos Santos Lima); *Spiritismo kaj Brazila religia diverseco: strategioj por disvolvigigi Esperanton* (Edgar Massaaki Ega-wa); *Aplikado de Esperanto en disvastigado de spiritismo tra la mondo* (José Passini); *La portugallingva trilogio de la tri literoj E: Evangelho, Spiritismo kaj Esperanto* (Lício de Almeida Castro); *Roloj de Departemento pri Esperanto de BSF kaj de BAES* (Affonso Soares); *Spiritismo, Esperanto kaj la evoluado de la regeneracia periodo* (Robinson Mattos).

La sabatan vesperon okazis koncerto, en kiu sin prezentis pianisto Lucian Lorens Ramos, gelernantoj de la lernejo *Chico Xavier*, kantisto Euzébio Carvalho Lopes, muzikensemblo *Nova Erao* el la lernejo *Lazaro Ludoviko Zamenhof*.

Dimanĉe, la ĝenerala asembleo de BAES diskutis plurajn aferojn; oni fiksas la okazigon de estontaj BRES je la unua tago post la Brazila Esperanto-Kongreso kaj samurbe.

Carlos Maria

Printempa MEVO en Adriatiko

Ankaŭ la 2a MEVO (Marborda Evento), okazis dum la unua printempa semajnfino, nord-adriatike, en Kvarnera golfo, ĉi-foje en Opatija/Abbazia, la naskiĝurbo de kroata turismo.

La novtipa kaj nekutima aranĝo renkontigis grupon de esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto el Italio kaj Kroatio, ĉefe el najbaraj regionoj.

Dum la aranĝo, imagita kiel “kontraŭkriza”, plifortiga kaj ripoziga, la partoprenantaro, kvankam ĉefe pensiula, estis tre moviĝema. Memstare kaj propraritime ili vizitadis kaj esploradis la proksimajn pitoreskajn urbetojn Brseĉ, Mošćenice, Mošćenička Draga, Lovran, Volosko kaj, kvazaŭ vera gastronomia patrolo, elprovis kie oni manĝas la plej bonajn salikokojn.

Ankaŭ por neesperantistoj estis interese renkonti la ĉefdelegiton de UEA por Kroatio, Boris Di Costanzo, konversacii kun li itallingve kaj profiti liajn praktikajn priturismajn kaj aliajn informojn pri Opatija, lia loĝurbo.

La sabatan vesperon la speciala gasto de *Orbis Pictus*, Manüel (Emanuele Rovere), en malformala etoso de la hotela ĉambro, aŭskultigis sian ĵus faritan kompaktdiskon *Duonvoĉe ... tutkore*. MEVanoj kontente ŝvebis en la etoso de la konataj “porĉiamaj” kantoj, interpretitaj de Manüel, kaj fine ricevis la diskon donace. Donacante la diskon, Manüel informas pri la bonfara asocio *Evidente*, kiu helpas al blindaj infanoj en Afriko kaj en aliaj landoj, kaj al kiu bonvenas la financaj kontribuoj.

Viŝnja Branković

Junularo agadas en Hungario

Mi, kiel sufiĉe nova persono en HEJ sed jam kiel nova estrarano, povas aserti, ke la Hungara Esperanto-Junularo havas tre bonan teamon. Ĝi konsistas el estraranoj tre agademaj kaj kelkaj helpantoj (komence mi menciis Andi Ottrok kaj Edit Lindwurm).

HEJ faras multe da aferoj. Ĝi organizas ĉiumonatajn programojn por renkontiĝi kaj uzi nian ŝatatan lingvon. Ili estas kaj por junuloj kaj por maljunuloj, mezaĝuloj, por ĉiuj. La majan programon okazigas Sarolta Bagó, nia ĉefdesegnisto kaj dezajnisto. Pli da informoj estas en nia retejo: www.esperanto-junularo.hu.

Ĝi estas tute nova paĝo, kiun mi kaj Vilté Székely redaktas, kaj multege helpas Bálint Rikker. Dum la rekreado de la retpaĝoj ni atentis ankaŭ pri la opinioj de eksterhungariaj esperantistoj (inter aliaj mi multe dankas al Paweł Fischer-Kotowski pro la konsiloj). Ni faris ankaŭ la hungaran version www.eszperanto-ifjusag.hu por ke ankaŭ la novuloj povu informiĝi.

La dua grava ero de nia agado estas JER (Junulara Esperanto-Renkontiĝo). Ĉi-jare ĝi okazis 12–14 mar en Velem. Krom la bonegaj programoj, ludoj, kantado, ekskurso, tie okazis ankaŭ la kutima jarĉefkunveno. Unue ni priparolis la okazintaĵojn en la jaro 2010, ni pritaksis la financajn detalojn, dank' al la bona laboro de nia financistino Krisztina Dévainé Gede. En la posta balotado por la estraro de HEJ Petra Smidéliusz denove estis elektita kiel prezidantino.

Nia plej granda aranĝo estas la Internacia Junulara Semajno, kiun ĉi-jare ni okazigos jam la 22an fojon (ijs.hu/eo) proksime al Budapeŝto, en Búbánat-völgy. Ĝi estos malpli kosta ol pasintjare, sed same mojosa (ekzemple, pro la akvobatalo, esperanta kazino, homlupa ekskurso en arbaro, kaj la aŭkcio, kie eblos tuj elspezi la ĵus gajnitan Esperanto-monon). Venu ankaŭ vi!

HEJ agas multe por reklami siajn aranĝojn. Pri tio multe helpas Ditta Békési, kiu okupiĝas pri la novuloj kaj mesaĝlistoj. Verkiĝas pliaj artikoloj por la retpaĝoj. Krome mi planas reklaman kampanjon en Budapeŝtaj stratoj pri Esperanto. Ni komencis kunlabori kun aliaj Esperanto-asocioj kaj volas daŭrigi tion ankaŭ estontece.

Kaj kompreneble ni helpas senĉese al la junaj, novaj esperantistoj enmovadiĝi.

Szabolcs Szilva



Momento el la februara renkontiĝo de junaj hungaraj esperantistoj.

Samtempe en Bydgoszcz

15–21 apr en Bydgoszcz okazis la 36aj Esperanto-Tagoj kaj la 37a sesio de AKB/AIS-klerigejo. La aranĝoj kune komenciĝis per AIS-kursoj, gviditaj de pluraj fakuloj. La kursoj daŭris ankaŭ en aliaj tagoj.

En la Ĝenerala Kunveno de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz (ICKT) oni resumis la agadon dum 2007–11 kaj elektis novan estraron. ICKT havas pli ol 1200 membrojn kaj kontaktojn kun 125 landoj. Estis elektitaj 18 honoraj membroj, 102 aktivaj kunlaborantoj kaj organizoj en 38 landoj ricevis honorajn diplomojn. Oni akceptis novan Statuton de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK), kiu apartenas al ICKT.

Okazis ankaŭ la Ĝenerala Kunveno de la Internacia Klubo *Esperantotur* en Bydgoszcz, dum kiu oni resumis turisman agadon 2010/2011, akceptis vojaĝplanojn de junio 2011 ĝis junio 2012, kaj elektis novan 16-personan konsilion.

La studprogramon kompletigis bakalaŭra kaj magistra simpozio de AIS, kaj 21 apr post ekzamenoj oni enmanigis diplomojn de ISTK por gestudentoj el Afriko, Azio kaj Eŭropo.

La partoprenantoj vizitis la muzeon de diplomatio kaj spektis la plej novan filmon de Roman Dobrzyński pri ĉi-vinttra ŝipkrozado ĉirkaŭ la Suda Ameriko kun *Esperantotur*.

Estis eldonita porokaza utila informlibreto pri Bydgoszcz kaj pri la agado de ICKT, ISTK kaj *Esperantotur*.

Andrzej Grzębowski

Eventoj

Nilvange planas internaciĝi

La tria staĝo por lerni kaj praktiki Esperanton disvolviĝis 4–8 apr en Nilvange (nord-orienta Francio). La loka asocio Esperanto Thionville kaj Franca Fervojista Esperanto Asocio, kiuj kunorganizis la staĝon, allogis partoprenantojn el Belgio kaj el diversaj francaj regionoj por riĉa programo.

Ĉiumatene Bernard Vivier gvidis paroligan kurson por progresantoj, kaj André Cherpillod klarigis al la spertuloj tiklajn gramatikajn punktojn.

Ĉiuposttagmeze estis vizitado de la regiono: muzeo de la lorena fervojisto en la vilaĝo Rettel, fortikaĵo kaj muzeo de emajloj en Longwy, arta muzeo de pentraĵoj “Pompidou” en Metz kaj finfine la luksemburga ĉefurbo.

Ĉiuvespere okazis kultura programo, kadre de kiu estis montritaj kvar filmoj: de Bernard Vivier kaj Marie José Behm pri la Baltaj landoj kaj aparta filmo pri la Universala Kongreso 2005 en Vilno; de Daniel Cano pri renkontiĝo en Bolivio cele al pli justa ekonomio; kaj *Water Makes Money* pri la privatigo de akva servo kaj ties problemoj.

En sia prelego “Kial kaj kiel Esperanto estas facila lingvo?” André Cherpillod klarigis al la publiko, ke Esperanto respektas la tendencon de la homo al ĝenerala asimilado.

Ĉiuj estis kontentaj pri la programo kaj manĝaĵo en bona etoso. La regiono estas verda kaj belega apud tri najbaraj landoj (Belgio, Luksemburgio, Germanio), kaj la restado estas malmultekosta.

Ni rendevuos post unu jaro. Por instigi lernantojn paroli Esperante, ni serĉas instruiston el eksterlando kaj invitos alilandajn partoprenantojn por praktiki kune Esperanton.

esperanto-thionville@laposte.net

Bruno Henry

Pri Baŝkirio en Japanio

(Landa Agado) La 10an de aprilo en Nacia Muzeo de Tokio okazis Unutaga Kurso de Esperanto publike organizita de ok Esperanto-Grupoj de Tokio. Prelegis Saliĥ Zakirov pri “Baŝkirio en Rusio, la etno kaj la kulturo”, kun interpreto de Nakamura Daishin. Sekvis unuhora kurso de Esperanto de Inumaru Fumio. Poste ĉeestantoj interparolis kun Saliĥ Zakirov, kiu prezentis muzikan ludon per tre raraj muzikiloj de Baŝkirio.

Post la kurso komenciĝis elementa kurso de Esperanto en sep grupoj.

Syôzi Keiko

Printempa renkontiĝo en Hanojo

9 apr okazis en Hanojo la tradicia Printempa Renkontiĝo kun ĉeesto de multaj vjetnamaj geesperantistoj.

Unue Augusto Casquero parolis pri Doktoro Zamenhof, pri la naskiĝo de Esperanto, kun prezentado de fotoj, de la voĉo de la Majstro, de la kanto *Mi volas danki vin* de Georgo Handzlik, kaj de la himno de Esperanto. Li gratulis la vjetnaman movadon pro la entuziasma laboro por Esperanto, por la internacia amikeco, kaj por la preparado de la 97a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Hanojo en 2012.

Poste aktivuloj parolis pri sia Esperanto-agado; inter ili la junaj kaj talentaj esperantistinoj Flama Floro, Belinda (prezidanto de VEJO), Raquel, kaj reprezentanto de la Esperanta Universitata Asocio, kiu efike agas en la disvastigado de nia lingvo en la universitata medio.

Post la inaŭguro estis prezentita la aktivado ĉe la universitato kaj la preparado de la UK, far samideano Verda Rivero, kaj pri la vjetnama movado. Tuj poste universitataj studentoj instruis kaj kantis kun la ĉeestantoj amuzajn kantojn en Esperanto. Fine, post Esperanto-kvizo kun disdonado de belaj premioj, ĉiuj amikece kaj abunde kunmanĝis.

Augusto Casquero

Kantona omaĝo al d-ro Zamenhof

16 apr 2011 en la sidejo de la Asocio de Esperanto de Kantono (Ĉinio) okazis omaĝo al d-ro Zamenhof, okaze de ties mortodatreveno. La salono de la asocia sidejo estis plenplena de samideanoj kaj gelernantoj. Eĉ ne estis sufiĉe da sidlokoj por ĉiuj dezirantoj ĉeesti.

Parolis pri la Majstro nome de la loka movado Petro Ye, kaj kiel gasto Augusto Casquero, kiu dum kelkaj jaroj instruas Esperanton en Ĉinio.

Oni prezentis multajn fotojn de la tombo de Zamenhof en Varsovio. Ĉiuj povis aŭskulti la voĉon de la Majstro kaj poste la kanton de Georgo Handzlik "Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko". Ĉeestis grupo da ĉinaj samideanoj, kiuj intencas partopreni ĉi-somere la 96an UK en Kopenhago. Kiel kutime en tiaj aranĝoj, oni abunde manĝis fratece.

La kunveno estis tre sukcesa. Kor-tuŝa, emociplena, kun etoso samideana. Multaj ĉeestantoj renkontiĝis denove kun malnovaj amikoj, kaj ĉiuj deziras daŭre labori por la disvastigo de Esperanto kaj por la bono de la movado.

Augusto Casquero



Duoble Bela

Jen foto de ĉarma vjetnama knabino, 21-monata, kiu nomiĝas Bela. Ja vere bela, ĉu ne? Ŝi estas filino de tre aktiva esperantistino Bela Maro (Hai Ly), direktoro de la granda kaj bone ekipita infanĝardeno VSK (Vjetnam Super Kids = Vjetnamaj Superinfanoj) en Hanojo.

En tiu infanĝardeno okazos venontjare Internacia Infana Kongreseto (IJK). La instruistinoj kaj laboristoj de la infanĝardeno bone lernas Esperanton, por sukcese helpi en IJK.

Bela rapide lernas novajn vortojn en la vjetnama, en la angla, en Esperanto. Certe ŝi dum IJK povos bone komunikiĝi en Esperanto kun la infanoj alvenontaj el la tuta mondo.

Ĉu vi volas konatiĝi kun ŝi?

Augusto Casquero

Vivu la unua de majo!

Fariĝis kutimo ĉe Asocio Sennacieca de Esperantistoj-Laboristoj en Togolando (ASELT) partopreni en la unuamajaj manifestacioj. Ankaŭ ĉi-jare ASELTanoj, apud pluraj sindikatoj, reprezentigis en civila defilado.

La manifestaciantoj venis matene tra la stratoj de Lomeo al la parlamentejo, kie ili legis kelkajn deklarojn por peti plej bonajn laborkondiĉojn kaj salajrojn.

Posttagmeze okazis kunmanĝo de instruistoj de ses lernejoj de la kvartalo kie estas Instituto Zamenhof en la ĉefurbo de Togolando. Ĝin partoprenis ankaŭ ASELT. Antaŭ la komenco de la festo, ASELTanoj rakontis al ĉ. 150 partoprenantoj pri la Asocio kaj pri Esperanto. La unuamaja festo finiĝis vespere.

Apéléte Agbolo

Tra ĉefaj stratoj kun orkestro

Reviviĝis la esperantista tradicio viziti la sud-ukrainan urbon Odeso dum la humurfesto *Humurino* por partopreni la feston kaj propagandi Esperanton en la granda festa procesio.

En *Humurino-2011* partoprenis 25 jaltanoj, 13 kievanoj, 3 ĥarkovanoj kaj multaj odesanoj. La 1an de aprilo estis organizita paŝado en festa procesio tra centraj stratoj de Odeso. Jaltanoj preparis facile skandebajn ruslingvajn sloganojn, ekzemple: "Эсперанто в интернете изучают даже дети! www.lernu.net" kaj "Эсперанто — учение без мучения! www.lernu.net" kaj aliajn, kiujn portis ĉ. 60 esperantistoj kun verdaj koltukoj, inkluzive de gastoj el Pollando kaj Belgio kaj de infanoj el Odesa internulejo, kiuj finis elementan Esperanto-kurson de Tamara Popova. Odesanoj preparis mil vizitkartojn, kiujn dum la karnavalo kaj en la postaj du tagoj oni disdonadis al irantoj kaj spektantoj.

La 2an de aprilo okazis komuna fotado ĉe la monumento Zamenhof, farita de skulptisto Nikolaj Blajkov, kaj ekskursoj en la urbo laŭ du itineroj.

La 3an de aprilo okazis koncerto, kiu komenciĝis per honorigo de Semjon Vajnblat okaze de la 75-jara jubileo. Li montris la ĵus eldonitan kolekton *Fajro de amo* de siaj kantoj en la rusa kaj Esperanto. La Jalta Esperanto-teatro *Improviso* (reĝisoro Svetlana Kravcova) prezentis skeĉojn en la rusa kaj en Esperanto. En paŭzoj estis prezentitaj kantoj. Krom tio odesanoj okazigis konkurson de anekdotoj, proprajn poemojn legis Ljudmila Orajevskaja.

Bonvenon al *Humurino-2012!*

Semjon Vajnblat, Jefim Zajdman



Odeso: Esperanto. Lernado sen suferado (Fotis Viktor Vilha)

Unufraze

★ La konkluda dokumento de Eŭropa Civitansocia Platformo pri Multlingveco, en kiu membras 29 tuteŭropaj organizaĵoj, inkluzive de Eŭropa E-Unio (EEU), enhavas rekomendon de EEU, pri esplorado de la lernfaciligaj ecoj de pluraj lingvoj surbaze de la programo *Springboard to Languages* de E-Asocio de Britio. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 7 maj Eŭropa E-Unio disdonis specialan leteron al ĉiuj (751 personoj el 27 landoj) Eŭropaj Parlamentanoj en iliaj naciaj lingvoj. (RetInfo)

★ Laŭ informoj, kolektitaj de Pola ILEI-Sekcio, dum la lernojaro 2009–10 okazis en 23 Pollandaj urboj k vilaĝoj ne malpli ol 40 E-kursoj, inter kiuj 25 kursoj en 20 lernejoj. (Maria Majerczak)

★ Ekde 5 mar ĝis 9 apr denove okazis en la Jura Fakultato de la universitato UNAM (Meksiko) E-kurso, kiun gvidis Luis Córdova Arellano. (M. M.)

★ 16–23 apr en Kinŝaso (D.R. Kongo) Alain Delmotte k Andrea Bertrand gvidis seminarion de la landa asocio DKEA k de Konga ILEI-sekcio por 44 komencantoj k 20 progresantoj. (Landa Agado)

★ Antaŭnelonge ekloĝis en la E-urbo Herzberg tri esperantistinoj el Pollando: Ewa kun sia filino Estera (denaskulino) el Szczecin k Teresa el Poznano. (ICH)

★ En aprilo sub la gvido de Katalin Kováts ekfunkciis RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net), en kiu komencis 100-lecionan kursaron aliĝintoj el Belgio, Grekio, Nov-Kaledonio, Aŭstralio k Vjetnamio. (Edukado.net)

★ En la Asembleo de Esperanta Naturamikaro (ENa), okazinta 26 mar 2011 en Malago, la provizora prezidanto Julio Herrero estis elektita kiel la unua prezidanto de ENa por 2011–13; ENa en la Asembleo formale fariĝis la 31a establo subskribinta la Pakton. (HeKo)

★ 23 apr estis fondita Konga Ea Virina Asocio (KEVA), kies unua prezidanto estas elektita Nelly Masemi. (Landa Agado)

★ La estraro de ILEI decidis, ke la Konferenco de ILEI en 2012 okazos en Ĉinio, en unu el la du urboj: Xi'an aŭ Kunming. (ĈIIC)

★ La regiona gazeto *Konkurent* aperigis en du numeroj (24 k 31 mar 2011) vastan artikolon de la historiistino Vanja Jelazkova pri la biblioteko de la E-societo *Sukceso* en la bulgara urbo Vraco. (HeKo)



Apud Vjaĉeslav Ivanov staras Sargilana Sandar, administranto de la jakuta Vikifontaro, kiu prezentis la jakutan lingvon en la Peterburga festivalo. (*Fotis Aljona Starr*)

Vegane en Antverpeno

Vegetara dieto estas dieto en kiu oni ne manĝas bestojn (viandon kaj fiŝon), dum vegana dieto malpermesas ankaŭ produktojn de bestoj: ovojn, lakton kaj laktaĵojn, mielon. Veganoj ankaŭ ne uzas aliajn bestajn produktojn, kiel ledon, silkon, ktp.

19–21 mar 2011 okazis vegana semajnfino en Antverpeno (Belgio). Ĝi ne estis nur por esperantistoj, sed ĉar la organizanto, Lode van de Velde, estas vegano kaj esperantisto, venis esperantistoj, precipe el Belgio, franclingvanoj kaj nederlandlingvanoj, kaj eksterlandaj neesperantistoj, kaj do oni aŭdis plurajn lingvojn tie: la flandran (nederlandan de Belgio), la francan, la anglan, iom da germana, itala,...

Sabatmatene Yves Nevelsteen, flandra esperantisto, prezentis Esperanton. Post tio, mi montris kelkajn el miaj revuoj kaj rakontis pri la celo kaj agado de TEVA, kaj respondis kelkajn demandojn. Ni faris tion en la angla, kaj poste montriĝis ke fakte la franclingvanoj ne komprenis ĉion kion ni estis dirintaj. Ne vere klaras, kial ili ne petis tradukon aŭ klarigon. Eble ili pensis, ke ili jes komprenas... Iliaj individuaj demandoj post la prezento estis bona okazo refoje — kaj pli amplekse — klarigi pri TEVA.

Mi partoprenis nur unu tagon, tamen sufiĉis por vidi la bonan etoson. Okazis pluraj kuirlecionoj, ekzemple, pri italaj kaj hindiaj manĝoj, kaj pri desertoj.

Heidi Goes

LF nun ankaŭ por la plej etaj

Speciala programo por infanoj de antaŭlerneja aĝo iĝis la ĉi-jara novaĵo de la Lingva Festivalo en Sankt-Peterburgo, okazinta 17 apr en la neŝtata Neva Instituto de Lingvo kaj Kulturo. La festivalo de la jaro 2011 iĝis la kvina tiutipa evento en Sankt-Peterburgo.

Rimarkeble multaj infanoj, venintaj kun la gepatroj, partoprenis la pasintjaran festivalon. Tio pensigis la organizantojn pri speciala porinfana programo, kiun realigis infana psikologo Natalja Guseva kaj fakulo pri mezlerneja edukado Irina Galina. La programo fokusiĝis ĉirkaŭ evoluo de skribsistemoj, dum la infanoj havis agrablan eblecon krei siajn proprajn hieroglifojn kaj skribi sur argilo. Okazis krome gajaj ludoj kaj konkurso pri la rusa folkloro.

Kontraste al la jaro 2010, ĉi-foje estis prezentitaj la ĉiam popularaj lingvoj araba, ĉina kaj japana. Multaj spektantoj venis ankaŭ al la prezentoj de la novgreka, la “kampa lingvistiko” kaj Tokipono.

Esperanto estis prezentita kiel unu el la pluraj lingvoj, krome okazis “Esperanto-klubo” — 40-minuta programero, dum kiu interesatoj povis sperti interparolon en Esperanto kaj ekscii pri la aranĝoj kaj renkontejoj de peterburgaj esperantistoj. Kelkaj retaj lernantoj de Esperanto unuafoje kontaktis urbajn esperantistojn eksterrete dum la festivalo.

Enketado inter la partoprenintoj montris, ke la plej sukcesajn prezentantojn faris juna lingvisto Anton Somin, studanta en Moskvo kaj veninta speciale por la festivalo. Liaj prezentoj de la adiga, araba kaj pola lingvoj ravis la publikon. Ankaŭ ĉiuj partoprenintoj de la “Hispana klubo” (programero en la baza hispana) rememoras ĝin kiel elstaran, la klubon gvidis hispana studento Bruno Lopez Rubio. Inter la laŭdataj prezentantoj estas ankaŭ la jida, stenografio, “Finna klubo”, Esperanto, la jakuta kaj la japana. La Prezintinto de la japana, Den Patin, starigis rekordon, prezentinte kvar diversajn lingvojn.

La lingva festivalo en Peterburgo ne estas reklamejo de Esperanto; ĝia ĉefa celo estas atentigi pri la eblecoj de daŭra kaj samtempa lernado de lingvoj, pri interesaj trajtoj kaj uzeblecoj de la malpli konataj lingvoj de la mondo. Ankorau en la daŭro de la festivala programo la urba televidkanalo “100TV” emisiis novaĵon pri la festivalo.

Vjaĉeslav Ivanov

Eŭropo forgesis sian animon

de Dafydd ab Iago

“Osama bin Laden estis krimulo respondeca pri abomenaj teroristaj atencoj, kiuj kostis la vivojn de miloj da senkulpuloj. Lia morto faras la mondon pli sekura loko kaj montras ke tiaj krimoj ne restas senpunaj”, — diris José Manuel Barroso, prezidanto de la Eŭropa Komisiono. Li ne dubas pri la maniero en kiu mortis bin Laden, kvankam la Eŭropa Unio oficiale garantias la rajton je vivo por ĉiu, eĉ la plej fia krimulo. Bedaŭrinde, Eŭropo ŝajnas forgesi sian animon.

“Ĉi tiu estas ĉefa atingo en niaj penoj forigi terorismon el la mondo. La Eŭropa Unio daŭre staras ŝultron je ŝultro kun Usono, niaj internaciaj partneroj kaj niaj amikoj en la islama mondo en la batalo kontraŭ la plago de tutmonda ekstremismo kaj en la konstruado de la mondo paca, sekura kaj prospera por ĉiuj. La anonco pri lia morto konfirmas, ke ĉi tiu speco de terura ago neniam restos senpuna”, — daŭrigis Barroso sen pensi por



minuto, ke eĉ la plej fia krimulo rajtas je justa proceso kaj tribunalo.

Ankaŭ la pola prezidanto de la Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek forgesis tiun bazan rajton, garantiitan de la Eŭropa Unio al ĉiu, je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de iu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Plej grave, evidentiĝis ke Osama bin Laden eĉ ne estis armita.

“Kial nearmita viro ne estis arestita kaj metita al tribunalo por montri la veron al la mondo?” — demandis repre-

zentanto de la familio de Osama bin Laden. La familio de la mortigita teroristo kritikis la senhontan malobservadon de bazaj internaciaj rajtoj je justa proceso. Ĉiu akuzato devas esti supozata senkulpa ĝis pruvita kulpo fare de tribunalo.

Usono devintus sekvi la saman vojon kiel por la iraka prezidento Sadam Hussein kaj la serbia prezidento Slobodan Milošević — juĝo en tribunalo. “Ni asertas, ke arbitra mortigo ne estas solvo por politikaj problemoj kaj krima prijuĝo. La justeco devas esti farata videble”, — diris la familio de Osama bin Laden.

Bedaŭrinde, en ĉi tiu afero Barroso sekvis Usonon. Forgesante la rajtojn de la amasmortiginto bin Laden, Eŭropo efektive makulas sian kulturan kaj homrajtan animon, por kiu ĝi tiom fiere batalas. Same kiel granda plejparto de usonanoj kaj eŭropanoj, mi persone ĝojegas, ke bin Laden ne plu vivas. Aliflanke, mi ankaŭ nun malĝojas, ke niaj politikistoj neglektis defendi gravan principon: la rajton je justa juĝo por ĉiu, ankaŭ por la plej abomena krimulo.

Post la mortigo de Osama bin Laden

(HeKo) La mortigo de Osama bin Laden ne estingas la terorismon el “islama” matrico, sed ĝi povas konduki al la fino de la kolektiva timo kaŭzita de tiu terorismo kaj arte flegata dum jardeko, precipe en la angle-saksaj socioj.

La homa psiko mem bezonas kolektivajn timojn, kiuj varias laŭ la epoko, sed montras nur malsamajn facetojn de unu timo: tiu pro la morto. Mian infanaĝon akompanis la kolektiva timo pro la atombombo, al kiu sekvis tra la jardekoj aliaj: de la malsato en la tria mondo al la senlaboreco en la unua (kaj la ekse dua), tra la nova pesto nomata aidoso ktp. Evidente ĉiuj plagoj daŭre ekzistas (eĉ tuberkulozo revigliĝis) en la mondo, sed ili alternas en la unua plano. Simile al la buntaj lignaj figuroj de mezepoka turhorloĝo, ili aperas kaj malaperas laŭ la ŝanĝo de la horo.

Osama bin Laden eksilentis por ĉiam, ĝustatempe por cedi la lokon al alia kolektiva timo: tiu pro la (mal)novaj nukleaj centraloj. Probable ĉi-lastaj jam venkis super li, sed necesis definitive sendoganigi lian miton for de la aktualeco.

Venis do la momento postuli ke ĉesu la eksterordinaraj normoj de sekureco, kaj insisti ĉe la ĝenerala opinio por ke Okcidento komprenu ke ekzistas alia islama mondo: tiu de la junularo senperforte luktanta en Sirio aŭ Jemeno, kaj martire mortanta en la jasmena revolucio.

Per deklaro de la tiama Konsulo, Walter Ŝelazny, en marto 2003 la Esperanta Civito distanciĝis de la plej grava, komenca devojigo en Okcidento, kadre de la eksterordinaraj normoj de sekureco. Neniu alia organiza subjekto en Esperantio havis la saman kuraĝon, politike kaj kulture. Reveni nun al la ordinareco estas des pli grave, por popolo vivanta en diasporo kaj bezonanta maltension en la internaciaj rilatoj.

La subteno al la jasmena revolucio, la likvido de la lastaj diktatoroj en la mediteraneaj landoj, la trankviligo de la etoso

inter Okcidento kaj Islamo estas gravaj faktoroj por la progreso al justa paco, do ankaŭ por la progreso de la lingvo kaj kulturo de Esperantio.

Giorgio Silfer,

Konsulo de la Esperanta Civito

Tempo de murdistoj

La mortigo (kial ne diri *murdo*?) de Osama bin Laden lasas ombbron sur la bildo de Usono. La afero de kaptado de internacia krimulo postulis la organizon de certa internacia tribunalo, simila al tiu de Nurenbergo post la Dua Mondmilito. La senjuĝa murdo de murdisto estas respondo eble iom akceptebla aŭ almenaŭ komprenebla por iu privata venĝisto — ne por mondpotenco. Des pli ne por tiu, kiu sin proklamis protektanto de demokratio kaj juro sur la tuta planedo.

La plano de Obama en ĉi tiu kunteksto ne povis esti alia ol preni la krimulon viva kaj organizi proceson kiu malfermus *urbi et orbi* la risortojn de la monda terorismo. Probable, temis ĝuste pri risortoj. En tiu obskura meĥaniko de teroro kaj teruro estis kaj estas iuj sekretaj risortoj ne malfermendaj, kaj bin Laden-atestanto ne eniris la skemon de solvo de tiu problemo.

Mortigi sen juĝo ne estas bona ekzemplo. Eĉ se oni mortigas tre grandan krimulon, kiu meritas morton. Mortigi sen juĝo tentas sekvi la venĝiston. Tiam Juro malaperas el la horizonto, kaj la volo de la forta iĝas mezurilo de ĉiu juĝa takso. Tio signifas la finon de Justeco. Tio signifas la revenon al sovaĝa praepoko kiam la sola leĝo estis tiu de la pugno.

Ĉu ni ne estas jam en tiu obskuriĝa periodo de retroevoluo de nia civilizo? La pasinta dudeka jarcento — kruela kaj barbara — kun riveroj da sango en la du mondmilitoj, tiu epoko de diktatoroj kaj diktaturoj — markis tre evidente la inversan klinon de la homaro.

La komenco de la nova jarmilo konfirmas ĝin okulfrape.

Alen Kris

100 mil uzantoj ĉe lernu!



Apenaŭ ekzistas ret-uzantoj, kiuj parolas Esperanton kaj nenion scias pri *lernu!*. Jam pli ol ok jarojn tiu ĉi paĝaro estas la plej granda reta Esperanto-kurs-ejo en la mondo kun detalaj informoj pri Esperanto kaj pri la

Esperanto-movado, tradukitaj al 36 lingvoj.

Ĉiumonate ĝin vizitas pli ol 150 mil personoj, kiuj tragardas averaĝe pli ol 3 milionojn da paĝoj. Tiamaniere *lernu!* funkcias ankaŭ kiel la plej granda inform-fonto pri Esperanto al ekstera publiko. En ĉi-jara majo ĉe *lernu!* devas registriĝi la 100.000a uzanto! Okaze de tiu evento *lernu!* organizas konkurson kun kelkaj valoraj premioj.

Ĉe *lernu!* oni povas trovi multajn kursojn, ekzercojn, diversajn vortarojn kaj testojn. Krom tio ĉe *lernu!* ekzistas pluraj iloj por praktika uzo de la lingvo: la eblo interŝanĝi privatajn mesaĝojn kun aliaj uzantoj, sendi bildkartojn, skribi en la tujmesaĝilo kaj uzi multlingvajn forumojn. Ĉiumonate oni sendas averaĝe 7000 privatajn mesaĝojn kaj skribas ĉ. 3500 mesaĝojn en la forumoj.

La projekto iĝis ebla dank' al kunlaboro de multaj personoj. Ja krom la kerna teamo, kiu zorgas pri la paĝaro, la projekton diversmaniere helpas ĉ. 200 helpantoj, kiuj tradukas la paĝaron, lingve helpas uzantojn, respondas komentojn, plibonigas vortarojn, testas kaj komentas.

Antaŭ kelkaj jaroj *lernu!* decidis okupiĝi pri instruado de Esperanto ne nur rete, kaj en julio 2011 en la slovakaj urbo Nitra okazos jam la kvara renkontiĝo de *lernu!*-uzantoj — Somera Esperanto-Studado (SES). La programo kutime estas tre riĉa kaj interesa. SES estas unika aranĝo, ĉar plej multaj partoprenantoj kutime estas tute novaj en la movado. Estas sendube sufiĉe interesa kaj nekutima sperto partopreni Esperanton-aranĝon, en kiu la plejparto de partoprenantoj ne estas konata. Pli da detaloj estas troveblaj ĉe <http://lernu.net/ses>.

Ekzistas multaj planoj pri la estonteco de *lernu!*; ekzemple, ni ŝatus refari kaj freŝigi la aspekton de la paĝaro, simpligi la strukturon, pli profunde kunligi la tuton kun aliaj retaj servoj kaj paĝaroj, adapti la tuton al novaj retumiloj k. s. Kvantkam realigo de tiaj deziroj ĉe tiom granda kaj ampleksa paĝaro estas tre malfacila kaj ambicia tasko.

La projekton *lernu!* realigas la internacia organizo Edukado@Interreto (E@I, <http://ikso.net>) kun la financa subteno de la usona esplorfondaĵo Esperantic Studies Foundation (EFS, <http://esperantic.org>) kaj donacemo de kelkaj uzantoj.

Jam delonge *lernu!*-teamo revis pri la eblo realigi similan projekton ankaŭ por aliaj lingvoj. Finfine, E@I kunlabore kun kelkaj partneroj sukcese lanĉis unuan version de tia paĝaro — <http://slova.ee>. Temas pri la paĝaro por lernado de la slovakaj lingvoj, kiu estas subtenita de la Eŭropa Komisiono. Tio estas la unua provo utiligi la spertojn, akiritajn ĉe *lernu!* por konstrui similan paĝaron por alia lingvo. La paĝaro estas tradukita ankaŭ al Esperanto.

Se vi planas viziti Someran Esperanto-Studadon ĉi-jare, vi jam scias, kie vi povas lerni la slovakon.

Jevgenij Gaus

teamano de *lernu!* kaj estrarano de E@I

Savi la vivon!

Sergej Bronov (Ruslando) 50.000 rub	1250,00
Věra Barandovská-Frank (Germanio)	300,00
Klara Ilutovič (Ruslando) 5.000 rub	125,00
Russ Williams, Anna Skudlarska (Pollando) \$100,00	69,80
Tomasz Stachowicz (Pollando)	50,00
EK Murmansk (Ruslando) 2.000 rub	50,00
Jelena Afanasjeva (Ruslando) 2.000 rub	50,00
Anonima (Nederlando)	500,00
Luís Ladeira (Portugalia)	20,00
EK Metz (Francio)	200,00
Josef Šemer (Israelo)	100,00
E. Hennig Olsen (Danlando)	100,00
Henri Masson (Francio)	47,62
Akira Morita (Japanio)	200,00
Sten Johansson (Svedio)	300,00
Eugen De Zilah (Francio)	100,00
Ilona Koutny, Zbigniew Galor (Pollando)	800,00
Leopold Patek (Aŭstrio)	100,00
Boris Kolker (Usono)	200,00
Senad Čolić (Bosnio kaj Hercegovino)	100,00
Luis Serrano Pérez (Hispanio)	50,00
Josef Schiffer (Germanio)	50,00
IKUE-ano (Nekonata)	50,00
Roy McCoy (Nederlando)	100,00
Anja Karkiainen (Finnlando)	100,00
Sergio Pokrovskij (Ruslando)	500,00
Anatolij Ionesov (Uzbekistano)	100,00
Douglas Draper (Norvegio)	100,00
Tiina Oittinen (Finnlando)	100,00
Päivi Saarinen (Finnlando)	50,00
Parizano (Francio)	1.000,00
Jennifer Bishop (Aŭstralio)	25,00
Anonima (Francio)	300,00
Roland Larsson (Svedio)	100,00
Manfred Westermayer (Germanio)	50,00
José Antonio Vergara (Ĉilio)	50,00
Jacqueline Huberdeau (Francio)	200,00
Mila van der Horst-Kolińska (Nederlando) 5.000,00 zł	1.221,30
Hossein Firooznia (Usono) \$50,00	35,10
Walter Źelazny (Pollando/Francio) 400,00 zł	100,00
Gertruda Kowalczyk (Pollando) 50,00 zł	12,75
PZE Bielsko-Biała (Pollando) 50,00 zł	12,75
Bjalistoka E-Societo (Pollando) 780,45 zł	199,09
PEA/Warszawa (Pollando) 160,00 zł	40,40
Anonima (Germanio)	100,00
Duncan Charters (Usono)	50,00
Michel Duc Goninaz (Francio)	100,00
Malcolm Jones (Britio)	551,25
Moisej Bronštejn (Ruslando)	40,00
Wera Blanke, Detlev Blanke (Germanio)	200,00
Angelos Tsirimokos (Belgio)	1.000,00
Anonima (Balkanoj)	100,00
Lidia Jerofejeva, Sergej Potoskujev (Ruslando) 5.000 rub	125,00
Katalin Kováts (Nederlando)	50,00
Monique Arnaud (Francio)	100,00
Konto <i>Espero</i>	400,00
Kerstin Kristoferson (Svedio)	1.121,08
Laborista EK en Stokholmo (Svedio)	4.035,87
Bertil Andeasson (Svedio)	56,06
Sume je la 5a de majo 2011	17.238,09 eŭroj

Koran dankon pro la donacoj kaj pro konsolaj kaj sandeziraj mesaĝoj, kiuj kortuŝas kaj esperigas nin. Donacoj estas plu akceptataj ĉe la UEA-konto “gore-z”. Oni povas pagi ankaŭ al kelkaj bankaj kontoj (eŭra, rubla, zlota), per PayPal, per Jandeks-denjgi.

Aleksander Korĵenkov

Mia apliko de lingvistiko al Esperanto

La dua eseo de Ryszard Rokicki

Esperanto-Movada lingvisto-gramatikisto kaj lingvisto-vortaristo devas saĝe ekvilibri inter:

— **pura scienca sinteno**, kion bone bildigas la vortoj de Baudouin de Courtenay, kiu komence de la pasinta jarcento skribis: "... dilemoj, kiel oni diru, ne ekzistas"... ĉar "scienco konstatas faktojn kaj klarigas ilin, sed ne deklaras ukazojn aŭ ordonojn nek amikajn konsilojn al junularo"¹.

- **praktika, ĉefe pordidaktika apliko de la lingvistika sciario**, do helpo surbaze de sia scio kaj praktiko pritaksi konsekvencojn de tiu aŭ alia solvo de diversaj dilemoj rilate la korektecon de analizata formaĵo. Ekzemple, lingvisto devintus averti sian kolegon leksikologon, ke en la eksterlingva realo (t. e. en vendejoj aŭ bazaroj) ekzistas ne nur *acidaj*, sed ankaŭ *krudaj* kukumetoj. Rezulte de tia averto la aŭtoro/redaktoro de la vortaro certe reprepensus sian difinon, ekzemple, de la vorto "kukumeto"². Analoge pri la uzo de la vorto "normala" kun la signifo "porinstruista"³. Aliloke lingvisto povintus klarigi al sia kolego gramatikisto, kiu verkas artikoleon pri akcentado de Esperantaj vortoj, pri diversaj aspektoj de la akcenta fenomeno ĝenerale kaj eble tiel helpus al li pli lerte vortumi la eksplikajn regulojn de la gramatika manlibro⁴.

En mia apliko de lingvistiko al Esperanto, mi celas esplori bazajn aspektojn de morfologia sistemo de Esperanto. Kiel esperantisto kaj praktika lingvo-uzanto, mi celas multe pli la instruistan ol la lingvistikan sciencan medion, sekve mi ne pretendas esplori Esperanton por serĉi t. n. lingvajn universalajojn kaj kontribui al la ĝenerala lingvoscienco, sed por trovi respondojn aŭ eble nur proponojn pri diversaj aspektoj de nia lingvouzo. En la analizo de Esperanto, mi sekvas malnovan (antaŭ-Chomsky-an), antropologiecan tradicion, rekomendantan priskribi lingvojn laŭ iliaj propraj karakterizaĵoj per la nocioj por ili karakterizaj. Mi esperas per tio iom helpi al interesatoj trovi alternativajn alfrontojn al la lingvopriskribaj problemoj kaj sekve aliajn solvojn kaj eble ankaŭ pli bone kompreni se ne la tutan Esperanton⁵, almenaŭ ies propran lingvaĵon.

Mi aplikos al la lingva korpuso de Esperanto esplorteknikojn konatajn en lingvistiko, evitante samtempe kaj rafinitajn nociojn kaj komplikajn sistemojn de strukturpriskribo. Strukturigado per krampoj kaj arbodiagramoj donas ja klare legeblajn rezultojn, sed bedaŭrinde kutime nur por lingvistike orientitaj lingvouzantoj. Pro tio mi anstataŭas ilin per *simpla parafrizado* de la analizataj strukturoj. Malgraŭ ke modesta kaj malnova, apliko de tiu tekniko povas liveri al ni novajn sciojn pri la funkciado de la lingva strukturo.

La *normo por gramatikeco* kaj signifo en Esperanto estas foje svagaj, kaj esploristo foje ne estas certa, ĉu la koncerna formaĵo apartenas jam al la lingva korpuso aŭ ankoraŭ ne, alivorte: ĉu ĝi estas korekta aŭ ne. Priskribante etnajn lingvojn, en dubaj kazoj, lingvistoj kutime demandas etnolingvanojn. En la kazo de Esperanto ne ekzistas etnolingvanoj kaj el metodologia vidpunkto la denaskaj esperantistoj ne estas la samo kaj ne povas anstataŭi ilin. Esprimiĝas eĉ dubo, ĉu pro manko de Esperantaj etnolingvanoj oni entute povas apliki lingvistikajn esplor- kaj priskribmetodojn al la lingvo mem⁶.

Miaopinie, manko de indiĝenaj parolantoj ne povas mal-ebligi al lingvisto priskribi lingvon eĉ "artefaritan". Ĉiu lingvo meritas objektivan sciencan esploron, mi diru esploron aŭtonoman, t. e. *corespondan al sia specifeco*. La specifeco de Esperanto kuŝas i. a. en la fakto, ke ĝi ne havas lingvouzantojn analogajn al la indiĝenaj etnolingvanoj, kies lingvaĵon priskribas lingvistoj. Lingvisto devas do havigi al si metodojn priskribi ĝin, eĉ se ili estos propraj nur al la lingvo Esperanto kaj ne aplikeblaj por alilingvaj priskriboj. Mi analizos kaj priskribos la lingvaĵon ne el la vidpunkto, kiel korekte esprimi komunikon al alparolato — kiel oni tion faras en kutima lingvopriskribo — do el la vidpunkto de etnolingvanoj, sed el la vidpunkto: *kiel mi komprenas la komunikon* ricevitan de mia komunikpartnero. Alivorte, ne el la vidpunkto, kiel oni diru, aŭ ĉu oni tiel diras⁷, sed el la vidpunkto: kiel mi — kiel ne etnolingvano — komprenas la komunikon. Mia kompreno de la komunikado, eĉ se subjektiva, kiel studobjekto rajtas esti samranga al la lingvaĵoj de etnolingvuloj. Sekve, la objekto de mia priskribo estas mia propra lingvouzo. Tian esploran aliron al la lingvo oni ja povas kritiki, sed ĝin pravigas, laŭ mi plene, mia (eĉ se iom modesta) partopreno en la Esperanta kulturo dum preskaŭ duona jarcento. Dum tiu periodo mi havis eblecon kaj konsultiĝi ĉe bonaj aŭtoroj⁸ kaj diskuti kun lingvaj eminentuloj por ne paroli pri seminariadoj kaj diversforma lingvistika aktivado. Mi plene konscias, ke mian lingvosenton karakterizas subjektiveco (t. e. influoj de la gepatra kaj lernitaj lingvoj), ke ĝi ne ĉiam **partneras** kun la lingvo-sentoj de aliaj esperantistoj, sed malgraŭ tioj, ĝi ja permesis al mi efikan interkompreniĝon dum pluraj jardekoj. Kaj cetere (kaj grave), kiel analizobjekto por mia lingvistikado ĝi estas relative **stabila kaj kohera**.

NOTOJ

1. Baudouin de Courtenay J. *Szkice językoznawcze*. Vol. I Warszawa, 1904. (traduko mia).

2. PIV, Paris, 1977.

3. Samloke.

4. Tion mi faris per la [artikolo](#): *Akcento en kunmetitaj vortoj* (*La Ondo de Esperanto*, 2010, №1).

5. K. Meiner en sia artikolo [La neebleco de priesperanta lingvoscienco](#) aperigita en *Lingva Kritiko* (2008), miaopinie tre trafe rimarkis, ke esperantistoj sukcese esprimas siajn ideojn per Esperanto, sed li pridubas, ĉu la alparolatoĵoj ĉiam same, t. e. konforme al la intencoj de la dirinto, perceptas ilin.

6. Detale tiun problemon prilumas K. Meiner en [La neebleco de priesperanta lingvoscienco](#) // *Lingva Kritiko*, 2008.

7. Multajn dubojn esprimis i. a. Bertilo Wennergren en sia ampleksa studo [Bazformoj de radikoj en vortaroj](#) en *Lingva Kritiko*, 2008.

8. En dubaj kazoj mi ankoraŭ nun konsultiĝas i. a. ĉe la Tekstaro, PIV, PAG, PMEG kaj la Lingva Kritiko.

"Mia apliko de lingvistiko al Esperanto" estas la dua ero en la triartikola ciklo de Ryszard Rokicki. En la venonta kajero de *La Ondo de Esperanto* aperos la tria: "Plurformismo en Esperanto". Komentoj estas bonvenaj.

Amiko Jozefo

Novelo de Guy de Maupassant

Konatiĝinte, ili intimis dum la tuta vintro en Parizo.

Perdinte kiel kutime la kontakton post la gimnazia tempofino, ambaŭ amikoj iam troviĝis en monduma vesperado, jam maljunaj kaj blankharaj, unu restinta fraŭlo, la alia edziĝinta.

S-ro de Mérout loĝis ses monatojn en Parizo, kaj ses monatojn en sia kasteleto de Torfvilao. Edziĝinte al la filino de najbara kastelmastro, li vivis pace kaj agrable, ekster taskozorgoj, kiel viro sen laborneceso. Kun temperamento kvieta kaj spirito limfata, sen aŭdacema inteligenteco aŭ liberiĝa ribelemo, li pasigis la tempon milde bedaŭrante la pasintecon, veante pri la hodiaŭaj moroj kaj institucioj, senĉese ripetante: “Sub kia registaro ni do vivas, mia Dio?” al sia edzino, kiu ĉielen levis la okulojn, kaj kelkfoje ankaŭ la manojn, signe de energia konsento.

S-ino de Mérout intelekte similis la edzon, kiel fratino sian fraton. Ŝi detradicie sciis, ke oni unue devas respekti la Papon kaj la Reĝon.

Kvankam ne konante ilin, ŝi tutkore amis kaj respektis ambaŭ, kun poezieca fervoro, hereda sindonemo kaj sentmildeco de nobele naskiĝinta virino. Bonkora ŝi estis ĝis la profundo de l’ animfaldoj. Neniam naskis ŝi, kaj l’ infanmankon senĉese bedaŭris.

Kiam s-ro de Mérout retrovis en iu balo Jozefon Mouradour, sian malnovan kamaradon, li elsentis de tiu renkonto ĝojon profundan kaj naivan, ĉar en sia junaĝo ili multe amis unu la alian.

Post laŭtaj miroj pri siaj korpaj kaj vizaĝaj ŝanĝoj pro la tempopaso, ili informiĝis pri la reciprokaj vivoj.

Jozefo Mouradour, sudano, iĝis konsiliano en sia regiono. Sincersintena, li parolis vigle kaj senrezerve, malkovrante sian tutan penson sen komplezo al sindeteno. Li estis respublikano, el tiu tipo de respublikanaj senafektuloj, kiuj dekretas leĝo sian senĝenon kaj efektas per parolmaniero krude sendependa. Alveninte la hejmon de sia amiko li tuj estis ŝatata pro sia elkora facileco, malgraŭ siaj politike progresemaj opinioj. S-ino de Mérout laŭtadis: “Kiel bedaŭrinde, ĉe viro tiel ĉarma!”

S-ro de Mérout ripetadis al sia amiko, per tono memcerta kaj konfidenca: “Ci havas nenian ideon pri la malbono, per kiu vi, respublikanoj, malutilas al nia lando”. Li tamen amegis Jozefon, ĉar nenio estas pli fortika, ol infantempa rilato retrovita ĉe l’ aĝo matura. Jozefo Mouradour priŝercadis la geedzan paron, nomante ilin: “Miaj amindaj testudoj”, kelkfoje allasante sin al laŭtaj deklamoj kontraŭ tradicioj, antaŭjuĝoj kaj malprogresemaĵoj. Kiam li tiel elfluigis la torenton de sia demokratema elokvento, la paro, en ĝeno, silentis pro ĝentileco kaj bonmoreco, kaj la edzo provis ŝanĝi la konversacion por eviti kunpuŝiĝojn. Ili akceptis Jozefon Mouradour nur en intimeco.

Eksomeris. Tiam neniam pli grandan ĝojon la paro Mérout sentis, ol akcepti geamikojn en sian bienon de

Torfvilao. Estis ĝojo intima kaj sana, ĝojo de bravaj kamparaj posedantoj. Ili veturadis al la najbara fervojstacio por akcepti siajn invititojn kaj ilin konduki hejmen, gvatante komplimentojn pri la regiono, la kreskaĵoj, la stato de la distriktaĵoj, la pureco de la kamparanaj domoj, la graseco de la brutaro surkampe vidata, pri ĉio spektebla ĝis horizonto.

Ili rimarkigis, ke la ĉevalo mirinde trovas, kvankam tiu besto surkampe laboras dum parto de la jaro, kaj kortuŝeblaj de la plej eta konstato, dankemaj al la plej eta afablaĵo, ili streĉe atendis la opinion de la novalvenantoj pri la familia bieno.

Jozefo Mouradour, invitita, anoncis sian alvenon.

La geedzoj venis al la stacio, plenfeliĉaj de la honoro lin akcepti hejmen.

Ekvidinte ilin, Jozefo Mouradour tuj salte elvagoniĝis kun hasto, kiu pliigis ilian kontenton. La paron li manpremis, gratulis, ebruiĝis per komplimentoj.

Laŭlonge de la tuta vojo li montriĝis ĉarma, mirante pri l’ alteco de l’ arboj, pri la denso de l’ grenkampoj, pri la rapido de la ĉevalo.

Ĉe la ŝtupara sojlo de la kasteleto s-ro de Mérout amikeme solenis:

“Ci nun enhejmiĝas!”

Jozefo Mouradour respondis:

“Dankon, kara, mi tion esperis. Ankaŭ mi, cetere, ne ĝenas min kun geamikoj. Nur al tia gastado mi konsentas”.

Poste li supreniris al sia ĉambro, por, li diris, vestiĝi kamparane. Li reaperis tute enkostumita el blua tolaĵo, kapkovrita per pajla ĉapelo, piedtegitaj per flavaj ŝuoj, en tuta maskerado de karnavaleska Parizano. Li ankaŭ ŝajnis pli triviala, pli ĝojaĉa, pli familiara, surmetinte kun la kamparvesto ian sendetenon, ian vulgarecon, kiujn li opiniis taŭgaj al la cirkonstanco. Tiu nova sinteno iom ŝokis ges-ojn de Mérout, kiuj ĉiam restis seriozaj kaj dignaj, eĉ sur siaj kampoj, kvazaŭ la nobela prepozicio de ilia nomo¹ devigus ilin al ia ceremonieco, eĉ en plej intimaj rilatoj.

Post la tagmanĝo oni vizitadis la farmojn, kaj la Parizano stuporigis la respektplenajn kamparanojn per la kamaradeska tono de sia parolado.

La vespermanĝon partoprenis ankaŭ la loka pastro, maljuna dikulo, kutime invitita ĉiudimanĉe, sed escepte ankaŭ ĉitage, por honorigi la novalveninton.

Ekvidante lin Jozefo grimacis, poste konsideris lin kun miro, kvazaŭ raran estaĵon el aparta raso, kiun li neniam vidis de tiel proksime. Dum la manĝo Jozefo rakontis senĝenajn anekdotojn, direblajn en intimeco, sed kiuj ŝajnis al la Mérout-paro ŝokaj en ĉeesto de ekleziano. Jozefo ne diris: “Sinjor’ abato” sed simple: “Sinjoro”; li embarasis la pastron per filozofiaj konsideroj pri



diversaj superstiĉoj ekzistantaj sur la surfaco de l' globo. Li diris: “Via Dio, Sinjoro, ja estas respektinda, sed ankaŭ pridiskutinda. La Dio mia nomiĝas Racio: de eterne ĝi estas malamiko de la via...”

En senespero la paro M  roul provadis deturni la Jozefan rezonadon. La pastro tre frue foriris.

Tiam la edzo milde diris:

“Ci eble iom tro aŭdacis antaŭ tiu pastro,    ne?”

Sed Jozefo tuj ekkriis:

“Admirinda, cia rimarko! Mi do devus   ni min antaŭ mitrulaĉo! Jen, cetere: komplezu neniam plu tedi min per la   esto de tiu ulo dum manĝoj. Invitu lin, laŭ via plaĉo, dum dimanĉoj aŭ labortagoj, sed diable ne kiel pladon al amikoj!”

“Sed, kara, lia sankteca persono...”

Jozefo Mouradour interrompis:

“Mi ja scias: oni traktu ilin kiel rozulinojn²! Konata regulo, bravulo! Nu, kiam tiuj uloj respektos konvinkojn miajn, mi mem respektos iliajn”.

Tiel   esis la diskuto    tiun tagon.

Kiam la morgaŭan matenon s-ino de M  roul eniris sian salonon, ŝi ekvidis, regantajn sur la tablo, tri gazetojn, kiuj retropelis ŝin: *La Voltero*, *La Franca Respubliko* kaj *La Justeco*.

Tuj sursojligis Jozefo Mouradour, daŭre blue vestita, atenteme leganta *La Senkompromisulon*. Li ekkriis:

“  i-enas admirinda artikolo de Rochefort³. Mirinda, tiu bubo”.

Kaj Jozefo   in laŭte legis, substrekante la   efbatojn, en tia entuziasmo, ke li ne rimarkis la envenon de l' amiko.

S-ro de M  roul enmanis *La Gaŭlon* por si, kaj *La Klarionon* por sia edzino⁴.

La arda prozo de la majstro verkisto, kiu renversis la Duan Imperion⁵, deklamata per sintruda potenco, kantata per la suda akĉento, sonoritis tra la paca salono, skuante la rektajn faldojn de la malnovaj kurtenoj, kaj ŝajnis la murojn, la grandajn fotelojn tapet-tegitajn, la severajn meblojn starantajn de jarcento en la sama loko, draŝi per hajlo da vortoj resaltantaj, cinikaj, ironiaj kaj disdetruaj.

Unu starante, la alia sidante, la geedzoj ŝtonigite aŭskultadis, en tia skandalo, ke e  plej etan geston ili ne kapablis.

Mouradour elpafis la finan sagon kiel lastan piro-teknikan sparko-  prucon, kaj triumfis:

“Nu! Skur  a, tiu draŝo,    ne?”

Sed li subite ekvidis la du gazetojn, kiujn portis lia amiko kaj mem restis senmova pro miro. Tiam, al li grandpaŝe irinte, Jozefo per kolerega tono demandis:

“Kion ci intencas per tiuj paperaĉoj?”

S-ro de M  roul hezite respondis:

“Nu... Ili estas... gazetoj miaj!”

“Gazetoj ciaj... Min ci mokas,    ne? Plezurige al mi, bonvolu legi la miajn; ili vigligos al ci la ideojn; kaj pri la ciaj, jen mia gesto...”

Kaj antaŭ ol la surprizita gastiganto povis malhelpi lin, Jozefo ambaŭ gazetojn kaptis kaj   etis tra la fenestro. Li poste solene deponis *La Justecon* en la manojn de s-ino de M  roul, prezentis *La Volteron* al ŝia edzo kaj profund-igis en fotelon por finlegi *La Senkompromisulon*.

La paro, pro delikateco, ŝajnis iom legi la respublik-ecajn foliojn, kiujn ili redonis apenaŭ tuŝinte ilin per la fingraj pintoj, kvazaŭ la papero entenus venenon.

Jozefo tiam ekridis kaj deklaris:

“Per tia nutrado dum nur unu semajno mi plene konvertos vin al miaj ideoj!”

Fakte post unu semajno li estris la domon. Li malpermesis la eniron de la pastro, kiun s-ino de M  roul sekrete vizitis; li malpermesis la eniron de *La Gaŭlo* kaj *La Klariono*, kiujn servisto mistere alportis de la poŝtejo, kaj kiujn oni kaŝe ŝovis sub la kanapajn kusenojn ĵus antaŭ lia eniro. Li   ion laŭpla  e ordigis, daŭre   arma, daŭre brava, kiel tirano afable   oja sed plenpotenca.

Atendataj estis aliaj geamikoj, homoj piaj kaj Burbonemaj⁶. La kastelanoj juĝis nebla la renkonton kun Jozefo Mouradour, kaj ne sciante kiel elturniĝi, anoncis iun vesperon, ke ili devas por kelkaj tagoj foriri pro afereto, kaj petas lin resti sola. Li tute trankvile respondis:

“Bonege; al mi tute ne gravas; mi   i tie atendos vin tiel longe, kiel vi volos. Mi jam diris: en amika bieno, ne restu ia   eno. Prave vi zorgas pri viaj aferoj, diable! Mi ne   agrene priripro  os vin, tute male, tio faciligas nian reciprokan rilaton. Iru, geamikoj, mi vin atendos”.

Gesinjoroj de M  roul foriris tuj la morgaŭon.

Jozefo atendadas ilin.

Tradukis **Jean-Luc Tortel**

Pro   i tiu traduko Jean-Luc Tortel iĝis laŭreato de [Liro-2010](#) en la branĉo “Prozo tradukita el la franca”.

NOTOJ DE LA TRADUKINTO

1. Preskaŭ   iuj nomoj de nobelaj familioj en Francujo entenas la prepozicion “de”, indikantan ne familian nomon, sed ilian posedatan lokon (ekzemple, Ludoviko Lazaro de Bjalistoko anstataŭ Ludoviko Lazaro Zamenhof).

2. Tiam vilaĝa romkatolika kutimo estis premii la plej virtan junulinon je   iu 15a de aŭgusto,   e la festo de la Sankta Virgulino. Ŝi ricevis monsumeton, bukedon de blankaj rozoj, la simbolon de virgeco, kaj estis nomita “Rozulino” (rosi  re). Kelkfoje ŝi naskis nur kelkajn monatojn poste...

3. Henri de Rochefort-Lu  ay, ĵurnalisto-politikisto, granda malamiko de Napoleono la Tria, kontribuis al la alveno de la posta Tria Respubliko.

4. Oni ne bezonas klarigon por kompreni, ke iuj estas tiutempaj dekstremaj gazetoj, la aliaj maldekstremaj.

5. Tiel nomas la francoj la imperion de Napoleono la Tria (nevo de la fama Napoleono), kiu dronis en la malvenko kontraŭ la Bismarka Prusujo.

6. La tiamaj reĝistoj dividiĝis en du kontraŭaj klanoj respondantaj al du elekteblaj reĝoj: la Burbonemaj, la Orleanemaj. La Burbonemaj estis la pli konservativa partio.

EKRELO, la forgesita eldonejo

Post 125 jaroj de la ekzisto de Esperanto, la kolektiva memoro de la esperantistoj diluigās pli kaj pli, multaj faktoj dronas en forgeso kaj la materia bazo por studoj kaj esploroj malkreskas pro konstanta detruigo de dokumentoj kaj aliaj materialoj. La averaĝa esperantisto sendube aŭdis pri *Hachette*, *Literatura Mondo* kaj *Stafeto* (se resti en la historio), sed la plimulto de iam eĉ tre produktivaj eldon-entreprenoj elglitis el la memoro kaj dormas en bibliotekaj sedimentoj.

Sendube EKRELO apartenas al ĉi kategorio. Dube, ĉu multaj kvizo-kandidatoj scias pri ĝi. La kadro de ĝia aktiveco estis la jaroj inter 1930 kaj 1936, pli precize la tiama movado laborista kies sorton sigelis kaj la naziismo kaj la stalinismaj purigoj. La kurta historio de la eldonejo estis ligita kun la opoziciaj disputoj en SAT: ili en 1930 kondukis al la fondo de la revuo *Internaciisto* kaj du jarojn poste al tiu de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro), kies oficiala eldonejo fariĝis EKRELO (Eldon-Kooperativo de Revolucia Esperanto-Literaturo).

La titolojn oni planis kaj produktis en Moskvo, la distribuon plenumis en Leipzig Walter Kampfrad (1901-1980), kiu en 1920 membriĝis en Komunista Partio de Germanujo. En 1932 li vojaĝis tra Soveta Unio kaj du fojojn estis arestita de la nazioj. Post la milito oni "reedukis" lin: li fariĝis prokuroro en la GDR-sistemo, sed ne plu aktiviĝis por Esperanto.

Post la potenc-transpreno de la nazioj EKRELO formale pluekzistis en Amsterdamo, de 1936 en Nîmes. Kiam en 1939 dissolviĝis IPE, ankaŭ la tagoj de EKRELO estis kalkulitaj. Tre kredeble la restintaj stokoj neniĝis, kio klarigas la relativan raron de la aperintaj titoloj: eĉ la Germana Nacia Biblioteko en Leipzig, kvankam ĝi devus posedi ĉion, havas nur parton de la eldonoj. Tamen preskaŭ kompletan kolekton posedas IEMW kaj lasta-tempe ankaŭ Federacia Arkivo Berlino (kolekto Detlev kaj Wera Blanke).

La pliparto de la EKRELO-titoloj estis politika literaturo propaganda, same senvalora (ankaŭ lingve) kiel la komunismaj pamfletoj aperintaj en Pekino, Hanojo kaj ali-loke. Al la plu konataj aŭtoroj apartenas i. a. Karl Radek (1885-1939) kaj Iosif Stalin (1878-1953). Projekto eldoni la tutan verkaron de Lenin neniam realiĝis. Daŭran valoron havas nur la esperantologiaj kaj interlingvistikaj verkoj same kiel iuj beletraĵoj, i. a.



la romano *Metropoliteno* de Vladimir Varankin (1902-1938). La produktadon de EKRELO oni povas klasifiki jene:

1. politikaj titoloj (la granda plimulto)
2. originala beletro
3. tradukita literaturo
4. esperantologio/interlingvistiko
5. lerno-libro

Al la originalaj beletristoj apartenis la hodiaŭ forgesita Flamo, pseŭdonimo de estona komunisto kaj posta (en Francujo) katolika pastro John Robert Lepp (1909-1966), kiu aperigis *Du teatraĵoj* (1932), rakontaron *La maja festo* (1932) kaj politikajn *Je la sojlo de milito imperialisma* (1932). Indus reeldoni unu-volumo ĉi tri verketojn kune kun studo pri la biografio kaj la filozofia-religia verkaro de ĉi mistera aŭtoro. EKRELO eldonis verkojn ankaŭ de la bulgaroj Ĥristo Gorov (1908-1999) kun rakontoj *Ĉe abismo* (1932) kaj Asen Grigorov (1903-1985) kun novelaro *La himno* (1931) kaj poemaro *Ruĝa aŭroro* (1932), Vladimir Kuzmiĉ (1904-1943) kun novelo *Solidareco* (1931), Eŭgeno Miĥalski (1897-1937) kun poemaro *Fajro kuracas* (1932) kaj la jam menciita Varankin.

Nur Miĥalski kaj Varankin ankoraŭ konatas nun-tempe, la lasta ĉefe pro sia plur-foje reeldonita romano. La plej fekunda soveta esperantologo Ernest Drezen (1892-1937) publikigis ĉe EKRELO tri verkojn: *Historio de la mondlingvo*, plur-foje reeldonita kaj tradukita, *Analiza historio de la Esperanto-movado* kaj *Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro*, ĉiuj represitaj inter 1967 kaj 1983. Apartan gravon havas lia *Historio de la mondlingvo*, la unua provo post Couturat/

Leau (1903-1907) skizi la plenan panoramon de la interlingvistikaj klopodoj. La verko enhavas multe da eraroj en detaloj: ilin, en nova, komentita eldono korektis la rusa interlingvisto Sergej Kuznecov (Moskvo 1991).

Al la tradukitaj "beletraĵoj" apartenis jenaj aŭtoroj:

bulgara: Geo Milev (ps. de Georgi Milev Kasabov, 1895-1925);

germana: Willi Bredel (1901-1964), Georg Waldemar Pijet (1907-1988);

rusa: Isaak Bachrach (ps. Aleksandr Isbaĥ, 1904-1977), Aleksandr Bezimenkij (1898-1973), A. Ĉerniĥ, O. Demenskij, Oskar Erdberg kaj O. Tarĥanov (du pseŭdonimoj de Sergej Razumov, 1901-1938), Dmitrij Furmanov (1891-1926), Boris Lavrenev (1891-1959), Vladimir Majakovskij (1893-1930), Jevgenij Miĥejkin, Nikolaj Miĥajlov (1906-1982), A. Suĥanov, Fjodor Svjatenko, Sergej Tretjakov (1892-1937).

ukraina: Leonid Ĉernov (ps. de Leonid Malošijĉenko, 1899-1933), Petro Panĉ (ps. de Pjotr Panĉenko, 1891-1978), Ivan Tkaĉuk (1891-1948).

Aldoniĝas *Kvin jaroj. Literatura Almanako* (1936).

Ĉe EKRELO ankaŭ Lev Ĵirkov (1885-1963) aperigis sian studon *Kial Esperanto venkis?* (en 1974 reeldonita en Japanujo).

La aŭtoroj kaj la tradukintoj de beletraĵoj dividas la komunan sorton de forgesiĝo: la laborista literaturo kiel sentinelo de politika propagando iĝis nelegebla kaj restas stud-objekto nur por fakuloj, la tradukintoj neniam konatiĝis ekster la kadro de EKRELO nek lasis spuron en la lingvo. Tio, cetere, validas ankaŭ por la pliparto de la beletraĵoj aŭtoroj de la revuoj *Sennacieca Revuo* (1921-1924/25, 1924/25-1927/28; nova serio 1933/34-1939), *La Nova Epoko* (1922-1923; 1928/29-1930/31; 1932/33) kaj *La Nova Etapo* (1932-1933).

Fino-fara literatur-historio pri la laborista kaj proletara Esperanto-literaturo restas unu el la neplenumitaj sciencaj dezirindaĵoj. En ties kadro povus sepultiĝi eĉ la epizodeska eldonejo EKRELO.

La sola lerno-libro aperinta ĉe EKRELO estas franc-lingva adapto de Sergej Rublov fare de M. Boubon kaj V. Kolĉinskij (V. Elsudo).

Por pliaj detaloj mi referencas al mia verko: *EKRELO. Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo. Eldonejo, ties libroj kaj ilia trov-loko*. (Bad Bellingen): Edition Iltis 2010. 39 p.

Reinhard Haupenthal

Albumo simpla, sed simpatia

Inicialoj DC. Urbano: KD. — Donnevill: Vinilkosmo, 2010.

La aŭtoron de tiu ĉi disko, francon Eric Languillat, loĝantan en Germanio, mi, verdire, neniam antaŭe renkontis en la muzika parto de Esperantujo, kvankam laŭ la informoj de *Vinilkosmo* li koncertas kaj kreas jam de 2003. Certe, tio estas mia miso, tamen ankaŭ avantaĝo, ĉar mi nun povas prezenti miajn impresojn pri la albumo sen antaŭaj kaj fonaj (mal)preferoj.

La muzika ĝenro, prezentita en la albumo, estas originala kaj iom malfacile difinebla. Jes ja, estas elektronika muziko, sed ne brua, ne laŭta kaj ne por-danca. Jes ja, sonas kelkaj hiphop-similaj eroj kaj motivoj, sed tute ne insiste. Foje aŭdeblas rokaj elementoj, sed svaĝe kaj tute ne skue. La melodioj (ni uzu tiun vorton) estas simplaj kaj malgrand-diapazonaj, plejparte — eĉ recitativecaj. Ĉio ĉi sume pensigas min pri iu ritma variaĵo de la speco, iom simila al tio, kion oni nomas “ambient”-muziko: agrabla, ŝveba, iom diafana sono, kiu povas servi kiel bona fono sen altiri tro multe da atento al la melodio kaj la vortoj mem — kaj al tiu bazo la aŭtoro jen kaj jen aldonas kromajn elementojn. Malgraŭ la “diafaneco” de la sono, tute ne ĉiuj komponaĵoj sonas malstreĉige — foje aperas eĉ iom agresiva tono, tamen ĝi ne multe premas la aŭskultanton. La komponaĵoj estas riĉaj kaj variaj harmonie, tial entute impresas tre bone eĉ malgraŭ la sufiĉe rimarkebla ĉeesto de pesimisma/minora tono kaj relativa stila malvarieco de kanto al kanto.

“Estu ĉapo laŭ la kapo”

Aŭstria Esperanto-Federacio produktigis ĉapojn kun la brodita teksto *Esperanto de 1887*. La ĉapoj bone vendiĝas, kaj la laboro por la Esperanto-asocio en tiu projekto estas malgranda, ĉar en preskaŭ ĉiu urbo ekzistas brodaj-produktejo. Do loka produktado sen la ĝenaj sendokostoj bone eblas por regionaj Esperanto-asocioj.

Uwe Stecher



La tekstoj estas sufiĉe altkvalitaj kaj interesaj. La temaro de la kantoj koncernas ĉefe la amajn aferojn (tamen pritraktas ilin per sufiĉe nebanala maniero kaj ankaŭ sen tro da malklaraj metaforaj aludoj) kaj aktualajn problemojn de la homa socio (kiel senrespondeca vivmaniero k. a.). Gramatike la tekstoj bonas (mi trovis nur unu evidentan misuzon de la akuzativo kaj unu stilan malglatiĝon); la prononco estas sufiĉe klara.

La plej evidenta stranga apartaĵo de la albumo, laŭ mi, estas la miskongruo inter la seriozeco de la tekstoj kaj ioma senzorgeco de la muziko. La tekstoj kaj la muzika akompano kvazaŭ vivas siajn proprajn vivojn sen klara kunlaboro kaj interdependeco. Koncerne kelkajn erojn de la albumo eble indas paroli eĉ pri la “poezia teksto, voĉlegita fone de muzika akompano”. Tiun impreson plifortigas ankaŭ la plenum-maniero de la kantisto, kies voĉo ne estas forta kaj foje sonas preskaŭ kiel duonflustro. Tamen, la fina rezulto — nebanalaj tekstoj kantataj/legataj fone de ne tro agresiva elektronika muziko — kiel tuto estas tamen plaĉa.

La diskon akompanas tekstolibreto; sur la disko mem oni povas trovi karaokeajn versiojn de ĉiuj kantoj, pdf-version de la tekstolibreto kaj muzikvideon por la kanto *Berlino sen vi* (tre simple faritan, sed iom filozofie kortuŝan). Kiel apartan donacon oni povas trovi ankaŭ naŭ mp3-dosierojn kun la malnovaj kantoj de la artisto.

La ĝenerala impresio pri ĉio aŭskultita (se formeti la penojn percepti aparte la muzikojn, la tekstojn kaj la ceterajn elementojn) estas ja tre pozitiva. La disko certe plaĉos al tiuj, kiuj ŝatas foje simple aŭskulti muzikon sen dediĉi al ĝi tro multe da mensa atento. La relativa simpleco de la albumo neniam malutilas al ĝia ĝenerale tre bona sono.

Paŭlo Moĵajev

Maskerado denove en la angla

La 12an de aprilo 2011 en Novjorko okazis festo por lanĉi reeldonon de la angla traduko de la Esperanto-verko de Tivadar Soros *Maskerado ĉirkaŭ la morto**. La verko pritraktas la sukcesan transvivon de la familio Soros en Budapeŝto dum la sistema persekutado kaj mortigo de la hungariaj judoj fare de la nazioj en la finaj jaroj de la Dua Mondmilito.

La festo, en la hejmo de la financisto George Soros, filo de Tivadar, kunvenigis grupon de elstaraj intelektuloj de la regiono, inter ili la ĉefredaktoro de *New York Review of Books*, reprezentantoj de *New York Times*, pluraj verkistoj, kaj la konata televida komentariisto Bill Moyers. Ĉeestis ankaŭ fakuloj pri Esperanto kaj interlingvistiko Esther Schor kaj Arika Okrent.

La ĉefa parolanto estis Humphrey Tonkin, kiu, kiel tradukinto, prezentis la libron kaj parolis pri ĝia ekesto. Tion farante, li kaptis la okazon antaŭ atenta aŭskultantaro paroli pri Esperanto kaj ĝia formiĝa rolo en la vivo kaj pensado ne nur de la patro sed ankaŭ de la filoj Soros.


La libro aperis originale en Esperanto en 1965 kaj en dua eldono en la jaro 2000 — la jaro de aperigo (en Britio) de la angla traduko de Humphrey Tonkin. Poste aperis tradukoj ankaŭ en la germanan, rusan, hungaran kaj turkan, kaj estas en preparo tradukoj en la italan kaj la ĉinan.

Usona eldono aperis en 2001; tiun eldonon oni nun ree aperigas en Novjorko ĉe la eldona grupo *Skyhorse*. George Soros estis surpriza vizitanto en decembro en lanĉa festo de traduko de alia libro de la patro, *Modernaj Robinzonoj***, ankaŭ tradukita de Tonkin (kiel *Crusoes in Siberia*). Tiun feston organizis la grupo Esperanto por UN.

ESF

* Soros, Tivadar. *Masquerade: The Incredible True Story of How George Soros' Father Outsmarted the Gestapo*. New York: Arcade Publishing. 2011. 275 p.

** Soros, Tivadar. *Crusoes in Siberia and The Fairest Judgment*. New York: Mondial. 2010. 31 +93 p.



Dum kvar vesperoj nia kulturo floris en Seto

IREM okazis dum Pasko en Seto, agrabla Mediteranea urbo, sur la Langvedoka marbordo, fama pro siaj kanaĵoj, sia granda lageto de Taŭno, kiun oni povas admiri de la supro de la tre konata Mont Saint Clair.


Krom la prelegoj, laborgrupoj, jar-kunvenoj, debatoj, filmoprojekciado, danca ateliero, ekskursoj ktp (vd. p. 6) kvar riĉaj kulturaj vesperoj buntigis la programon de ĉi tiu renkontiĝo en la feriejo *Le Lazaret*.

2011 estas aparta jaro, kaj Seto estas aparta loko elektita pro la tridekjara datreveno de la forpaso de Georges Brassens, kiu ankaŭ naŭdekjariĝus ĉi-jare. Estis nature omaĝi tiun elstaran artiston, naskitan kaj entombigitan en Seto.

La ĉeesto de Jacques Yvart estis nepra, ja por li Georges Brassens estis la artista baptopatro. Lia veno estis markita per la apero de la ĵus eldonita albumo *Brassens plu*, kiun li ofereme donacis al la urbestro de Seto, okaze de la oficiala malfermo de IREM, por danki pro la akcepto kaj helpo, kiun la urbo donis por la Esperanto-aranĝo. Jacques Yvart kantis por la multnombra ĉeestantaro *La geamantoj sur la verda benk'* antaŭ la honorvino.

Jacques Yvart la sabatan vesperon kantis en la koncertejo *Georges Brassens* en la urbocentro, antaŭ ĉ. 400 IREM-anoj, kiujn kompletigis urbanoj kaj turistoj. La tekstoj, majstre tradukitaj en Esperanton, la interpretado de

Jacques Yvart kantas kanzonojn de Brassens (Fotis Joël Coquisart)



Jacques, la sobra kaj intima gitar-akompano kaj la akordiono de FAMo reeĥis emocie kaj kortuŝe en tiu grandega salono, kvankam la akustiko de la koncertejo ne estis tre taŭga por tiu intimeca kaj sentoplena spektaklo.

La antaŭa vespero, vendrede, la interkona vespero, estis gvidita de FAMo en festeca etoso, por akcepti la partoprenantojn de IREM en *Le Lazaret*. Artisto, kiu regas kutime humuron kaj mokon en siaj kantoj, FAMo tiu-vespere invitis kelkajn partoprenantojn, kiuj tradukis popolajn kaj tradiciajn kanzonojn, kaj kiuj instigis la plenplenan salolon al kunkantado kaj amuziĝado.

La ideo partoprenigi la ĉeestantaron motivis ankaŭ la bandojn *Kaj Tiel Plu* kaj *Kapriol!* kiuj danc-etosisis la dimanĉan vesperon denove en la koncertejo *Georges Brassens*. La unua venis el Katalunio kaj la dua el la nordo de Nederlando, Frislando.



Kaj Tiel Plu (Fotis Michel Cerisay)

Ili oferis muzikan kaj dancan vesperon, en kiu multnombraj partoprenantoj entuziasme kaj sinsekve dancis bureojn, "champonois", polkojn, valsojn, skotiŝojn por fini per momento escepte forta, dum kiu la du muzikistaroj, al kiuj aldoniĝis la violistino Françoise Noireau, venis muziki kune inter la publiko antaŭ la scenejo.


La lasta vespero, lunde, en *Lazaret* estis tre varia kun la humura teatraĵo *La grandioza kongreso* plenumita de la Tuluza Teatra Trupo (TTT), verkita de Rikardo Cash, postsekvita de koncerto de la okcitan kantisto Patric. La okcitan lingvo kuniĝis ĉi-vespere kun Esperanto dank' al la rimarkindaj tradukoj de liaj tekstoj en Esperanton fare de la moskvanino Ludmila Novikova, kiu venis al Seto admiri sian favoratan kantiston; tri el tiuj kantoj estis kantitaj de JoMo kun la gitara akompano de Patric.



Patric kaj JoMo en IREM (Fotis Michel Cerisay)

Poste JoMo malkovris al la plenege salono sian spektaklon kun la bando *Solniŝka* — kanzonoj, tradiciaj dancoj rusaj, ciganaj, slavecaj, per tre persona interpretado, foje humura, romantika, freŝa, leĝera, kun granda arta kvalito. Kun akompano de tri gedancistoj kaj tri gemuzikistoj, JoMo plian fojon ĉarmegis kaj konkeris la publikon.

Dum la tuta renkontiĝo la diskoservo de *Vinilkosmo* inter la du libroservoj (Espéranto-France kaj SAT-Amikaro) prezentis grandan elekton de diskoj (pli ol cent titoloj) inter kiuj furoris la plej laste aperintaj de *Kaj Tiel Plu*, *Kapriol!*, *Manŭel*, *Inicialoj*, *Dolchamar*, *Eterne Rima*, *Afrika Kompilo* kaj precipe *Brassens plu* de Yvart, de kiu ĉirkaŭ cent ekzempleroj estis aĉetitaj dum IREM.



Pliajn informojn kaj fotojn vi povas trovi en la retejo de la renkontiĝo:

<http://esperantosete2011.fr>

Françoise Eriksen kaj Flo

Denove kreskas la abonantaro de “La Ondo”

En la marta *Ondo* aperis resumo de la abonstatistiko por la 2010a jaro, laŭ kiu pasint-jare ni havis nur 509 abonojn — malplej multe dum la lastaj sep jaroj. Tiam ŝajnis, ke la malkresko daŭros ankaŭ en la nuna jaro. Feliĉe, tio nur ŝajnis. Je la 1a de majo 2011 ni ricevis jam 518 abonkotojn, kaj ĉi tiu nombro estas pli granda je 9 abonoj ol la definitiva jarfina nombro da abonantoj en 2010.

Je la nuna momento la landoj kun plej multaj abonoj estas Ruslando (76), Pollando (55), Germanio (41), Francio (37) kaj Brazilo (33). Plej multe al la kresko kontribuis tri landoj: Germanio (de 35 al 41), Brazilo (de 27 al 33) kaj Usono (de 17 al 23) — en ĉiu el ili jam estas je ses abonantoj pli multe ol fine de la pasinta jaro.

Ni dankas la abonantojn kaj la perantojn! Apartan dankon ni direktas al la brazila esperantisto **Alex Sousa Santos**, kiu propracie abonis dek samideanojn al la elektronika versio de *La Ondo*. Ni dankas ankaŭ al nia japana amiko, modeste kaŝinta sin sub la pseŭdonimo **Ĉerizfloroj**, kiu fariĝis dumviva abonanto.

Halina Gorecka, eldonanto

Aleksander Korĵenkov, redaktoro

PS. Oni povas aboni *La Ondon de Esperanto* papere kaj elektronike je iu ajn momento de la jaro. La dumviva abono kostas 1000 eŭrojn.

Leterkesto

La Ondo trovas kaj vivtenas trezorajn voĉojn en nia Esperantujo. La gazeto provizas varion respektive al la plena spektro de nia lingva kulturo, diversecon kaj serizon kombine.

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finlando)

Kara Aleksander, mi tre admiras vin kaj Halina. Imponan laboron vi faras, kaj *La Ondo*, kiun mi tre ŝatas, ĉar ĝi ligas min ankaŭ al Ruslando kaj Azio, enhavas kulturajn artikolojn, ĉiam aperas akurate.

Anne Jausions (Francio), prezidanto de OSIEK

Kun granda estimo kaj dankoj mi gratulas la redakcian teamon de *La Ondo de Esperanto* kaj deziras al ni ĉiuj pliajn riĉigajn kulturajn kaj movadajn artikolojn, al la redaktoroj multajn legantojn kaj antaŭ ĉio sanon.

Katalin Kováts (Nederlando), www.edukado.net

Ricevitaj libroj

Golec, Józef. *Słownik biograficzny esperantistów polskich*. — Cieszyn: Józef Golec, 2010. — 276, il. — [Aĉeto].

Hertlingo, Petro. *Tia estis Hirblo: Kiel Hirblo venis en la hejmon, kial li estas malsimila ol aliaj, kaj ĉu estas eble helpi al li* / Tradukis el la germana Esperanto-Grupo Alena. — Gerlingen: Eld. Blajhero, 1992. — 96 p. — [Donaco de Germana Esperanto-Biblioteko].

Hori Jasuo. *Raportoj el Japanio 13. Januaro-decembro 2009*. — Maebaŝi: Horizonto, 2010. — 190 p., il. — [Donaco de Hori Jasuo].

Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: *Kultura kaj socia fono: Aktoj de la 32-a Esperantologia Konferenco en la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko 2009* / Redaktis Christer Kiselman. — Rotterdam: UEA, 2010. — 64 p. — [Aĉeto].

Нобель, Альфред. Немезида: Трагедия в 4-х действиях / Пер. с эсп. Н. Крюкова. — Тамбов; М.; СПб.; Баку; Вена; Гамбург: Нобелистика, 2010. — 192 с.; 3000 экз. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

Ricevitaj gazetoj

Bulteno de Esperantista klubo en Praha, 2011/1; Dia Regno, 2011/1; EAB Update, 2011/53; Esperanto en Azio, 2011/71; Esperanto en Danio, 2011/2; Esperanto sub la Suda Kruco, 2011/105; Esperanto, 2011/4,5; Esperantolehti, 2011/2; Femina, 2011/25; Frat-eco, 2011/91; Heroldo de Esperanto, 2011/1,2,3; Informilo por Interlingvistoj, 2011/1; KAE-Informilo, 2011/74; Kataluna Esperantisto, 2010/355-356; Kontakto, 2011/1; La Brita Esperantisto, 2011/970; La Gazeto, 2011/153; La KancerKliniko, 2011/137; La Lanterno Azia, 2011/3; La Merkato, 2011/100; La Movado, 2011/720,721,722; La Revuo Orienta, 2011/2,3; Literatura Foiro, 2011/249,250; Monato, 2011/4; Norvega Esperantisto, 2011/1,2; REGo, 2011/2; Scienco kaj Kulturo, 2011/1,2; Scottish Esperanto Bulletin, 2011/1; Usona Esperantisto, 2011/1.

Literatura Foiro, 2011, №249

En *Literatura Foiro* №249 Julian Assange salutas ĉiujn nin, la (ne)koncer- nitajn de *Wikileaks*: la revuo metas ĝin akcente en sia februara numero kaj traktas la aktualan temon per la artikolo de Umberto Eco *Venĝemaj ret-piratoj kaj spionoj per diligencoj* kaj la deklaro de PEN Internacia, al kiu aliĝis la Esperanta PEN-Centro.

La komenciĝo de la 42a jarkolekto de LF proponas novajn specimenojn el nia originala literaturo: uvertura poemo de Carmel Mallia, poeziaj manuskriptoj de Fra Gaeta, humura rakonto de Jean-Luc Tortel kaj krimetoso kun Armando Zecchin.

En la voĉdonilo por la PEN-premio *La Verko de la Jaro*, kiun asignas ĉiujare la abonantaro de LF, kandidatas naŭ pro- zaj libroj surmerkigitaj en 2009/2010.

Prezento de kontribuajtoj al du PEN-konferencoj, en Bled kaj en Balĉik: *Paco inter tagaj kaj noktaj sonĝoj* de Edvard Kovaĉ kaj *Civilizacio kaj natura elekto* de Kostas Maritsas. En la rubriko pri literaturhistorio Leen C. Deij proponas sian eseon *Ekis en grotaj*. Ken Miner komentarias *Kvarteto-n* de Ronald Harwood en la traduko de Giorgio Silver (aperinta en LF 246 kaj 247). Mariana Evlogieva recenzas la libron *Pejzaĝo kun signaturoj* de Karla Erbova en traduko de Jaroslav Krolupper.

Premiere pri filozofio: *Hipioj en Grekio, fidelaj disĉiploj de Sokrato*, tuta ĉapitro el la libro de Nikolao Gudskov *Kiel la homo komencis pensi*, baldaŭ aperonta. Vinko Oŝlak ofertas modelan prelegon por specifa celgrupo: *Komuna lingvo por kristanoj*.

La prezidanto de LF-koop Marc Hiltbrand bondeziras okaze de la nova jaro per sia saluto kun titolo *Saĝo estas kion ni bezonas*. **HeKo**

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la martaj “Proverboj trovendaj” venis 18 respondoj. Ĉiuj estas tute ĝustaj, malgraŭ komposteraro en la unua enigmo. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones, Brian Bishop (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Erkki Kempainen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Jack Roux (Francio), Hans-Burkhard Dietterle, Edeltraut Henning (Germanio), Zbigniew Tytkowski, Russ Williams, Stanisław Płachta, Hanna Skalska, Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka (Pollando), Luís Ladeira (Portugaliao), Svetlana Konjašova, Anatolo Sidorov (Ruslando).

La libropremion ricevas **Luis Ladeira**, kiun ni varme gratulas.

La ĝustaj respondoj estas:

En feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu.

Se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos.

Proverboj trovendaj 2

Ni denove proponas samspecan taskon. Necesas solvi la enigmon de nekonata skribaĵo. En la suba teksto kaŝiĝas du proverboj el la *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof.

V ≤ ≠ C ≥ V ∃ ⊂ V ≈ ≠ ∃ ≠ C ≥ V ≡,
≡ C ⊃ ≥ ∞ ∃ ⊂ ≠ ∃ ≡ ∅ : ≠ C ≥ V ≡.

≡ ⊂ ∃ ≡ V ≤ ≠ V ≡ ≤ V ⊂ V ≠ ∃ -
⊃ ≥ ∇ V ≠ V ≡ ≤ V ∇ V ≠ ∃.

Viaj respondoj atingu la redakcion poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de aŭgusto.

Kompilis **Nora Caragea**

Juda humuro

Almozulo impertinento

Dum jaroj la malriĉa Jankel kutimis veni ĉiun monaton al la hejmo de la riĉa ŝtofvendisto Lejb por ricevi mondonacon.

Foje, kiam li venis al Lejb, la servistino diris al li, ke li ne plu ricevos monon, ĉar ŝia mastro estas elspezonta multege da mono por la geedziĝfesto de sia filino kaj por ŝia doto.

Malkontenta Jankel diris:

“Bone, sed bonvolu diri al li, ke li estus povinta doni al sia filino sian monon, sed ne la mian”.

El la kolekto de **Josef Ŝemer**



Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ne plu la verda drako, aŭ: Horora stumpo

UEA funkcias kiel monstro sen kapo. (Ĉielismo Wang Tianyi, 4 apr 2011, titolo de reago ĉe liberafolio.org/2011/drasta-membrofalo-ce-uea#1301886001)

Vampire kaj memŝpruce

UEA devas ... injekcii [tiele!] novan sangon (ne nur financan) en siaj vejnoj. (Amri Wandel, 4 apr 2011, groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6413)

La CO ne ĝenas la membrojn

Evidente, la stabo de CO estas sufiĉe profesia por povi kontentige kaj apenaŭ senteble por la mebroj [tiele] daŭrigi kontinue la laboron. (Sergeo Tyrin, 2 apr 2011, liberafolio.org/2011/osmo-buller-ne-revenos-en-marto#1301772367; rimarkis Kalle Kniivilä)

Eble do grasbulojn?

Mi provis, sed ne sukcesis trovi la manierojn en la paĝo de UEA lasi gastulojn. (Renato Corsetti, 28 apr 2011, groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/19052)

Limigita sindonemo

Giorgio Silfer ... Profesia instruisto, li delonge rezignis pri instruado, escepte de esperanto, senpage kaj al tiuj kiujn li mem akceptas... (HeKo 474 5-A, 22 mar 2011, esperantio.net/index.php?id=1643)

Di' venas kaj divenas

Al ĉi tiu lingvo, ne al la eminenta kaj ankaŭ niatempe glorata ĉe ĉiuj klasikaj kleruloj, sed tamen al la el ĝi divenanta, sed ne plu eminenta kaj renoma, Dio atribuis rolon esti la vazo por la plej grava enhavo... (Vinko Ošlak. *Komuna lingvo por kristanoj // Literatura Foiro*, 2011, №249, p. 51; rimarkis Ionel Oneț)

Prepare al Kopenhago, aŭ: Skandinavo kiel premio

Danon al ĉiuj, kiuj ne volis kredi, ke en nia E-komunumo forestos la parola voĉo de Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto! (Redakcio de la Pola Retradio en Esperanto, 22 mar 2011, diversloke, i.a. Europamaldektro.wordpress.com/2011/03/22/bonvenon-al-nova-pola-retradio-en-esperanto)

Ricevi Kobajaŝon, aŭ: Japano kiel premio


Kobajaŝi Tukasa... estis aljuĝita kiel premiito de Ossa-ka-Premio... (*Esperanto en Azio*, 2011, №70, p. 31; rimarkis Ionel Oneț)

Plukis **István Ertl**

Pli ol unu Obama

La 20an de marto 2011, dum la Usona prezidento Barack Obama paroladis en la municipa teatro de Rio-de-Ĵanejro, proksime de la teatro esperantistoj informis pri sia lingvo al publiko kaj al ĵurnalistoj. Kiel ofte en tiaj okazoj, estis pli ol unu prezidento, kaj jen sozio de Obama volonte pozis ĉe la Verda Standardo. Kiam la aŭtenta Obama faros tion?..


Evandro Caboclo




Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*
 Serio *Scio*, Volumo 9
 64 paĝoj, 6 eŭroj



L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
 Serio *Scio*, Volumo 6
 288 paĝoj, 24 eŭroj



Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
 Serio *Scio*, Volumo 8
 320 paĝoj, 27 eŭroj



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
 Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
 16 paĝoj, 3 eŭroj